

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 9

Septembro 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

La Harmonia Kongreso

Generala opinio de l' partoprenintoj tuta daŭro de la kongreso la suno monpost la ferma kunsido estis ke la 30-atris sin tre, eĉ tro favora, sed tuj en la Universala Kongreso de Esperanto enunua tago post la kongreso ĝi sin kaŝis, Londono estis vere sukcesa. Nenia nub-kaj la ĉielo postsendis al la kongresintoj eto de malkonkordo, nenia disputo, ne-adiaŭ-saluton malsekegan, nia misakordo. Plena harmonio regis en La 30-a Universala Kongreso akceptiuj kongresaj aranĝoj, en la solenoj, tis kelkajn tre utilajn decidojn. Ili konen la laborkunsidoj, en la fakkunveno, cernas unuavice la ekvilibron de In-en la kunsidoj de la Komitato. Eĉ kunternacia Esperanto-Ligo, kaj ni estas la ĉielo la Loka Kongresa Komitato ŝaj-certaj ke ili postsekvigos bonan rezulton. nis esti farinta kontrakton, ĉar dum la La gazetaro tre favore rilatis al la kon-

greso kaj raportis bone, kelkfoje en sprita kaj humorplena maniero, pri la kongres-aranĝoj.

Ke Londono estas urbego kiu, krom la kongreso, prezentas multe da interes-ajoj, allogaĵoj kaj ĝuindaĵoj, estas fakto tiel konata, ke preskaŭ ne necesas menci-ii ĝin.

La legantoj ne miros, ke en tiaj cir-konstancoj la kongresanoj sin sentis bon-fartaj kaj feliĉaj, kaj ke ili sincere be-daŭris, kiam sabate la plej multaj devis paki siajn valizojn kaj forlasi la urbegon, kiu dum unu semajno estis tiel afable gastiginta ilin.

Denove : Unueco estas Forto

La bona sukceso de la 30-a Univer-sala Kongreso pravas unu plian fojon, kion kapablas atingi celkonscie gvidata laboro kaj disciplina enordigo de sindonemaj kunlaborantoj. Kaj ĝi ankaŭ brie pruvis unu plian fojon la pravecon de la devizo de IEL ke « Unueco estas Forto ». Sen unu firma volo komuna ni estas nenio, — unuigitaj ni kapablos stormi la mondon.

La esperantistaro povas vere gratuli sin, ke fine ĝi posedas en IEL tiun unuecan organizon, por kies atingo ĝi luk-tis, batalis, diskutis, disputis dum multaj jaroj. Nun la disputoj finiĝis. La Londona Kongreso montris, ke pasis jam la tempo de senfina diskutado, ke *la unueca organizo estas fakto*, ke post unu-du pluaj jaroj ne nur la Ligo bilancos sen defcito sed ke ankaŭ la hipoteko sur la domo en Heronsgate estos forigita, kaj ke tiam fine oni povos komenci la or-ganizadon de grandstila laboro tia kia estos inda je nia Ideo kaj eĉ necesa pre-miso por la venkigo de tiu ĉi ideo.



En la Kongresejo de la Trideka.

Supre (maldekstre): En la Akceptejo — gesinjoroj D-ro Duncan ĵus ricevis siajn kongres-dokumentojn; (dekstre): En la Kongresa Banko deĵoras, preskaŭ nekonate de la multaj klientoj, s-ro Wadham, la kongresa prezidanto; malsupre (maldekstre): La librostando de Brita Esperantista Asocio, kun deĵoranto s-ro Wilkinson, ĝen. sekretario de BEA; (dekstre): Stando de f-ino Betty Ashby por helpo al la blindula kaso; ŝi vendas produktojn de la ĉokolada fabriko Cadbury, provizitajn favorepreze. La firmo multe subtenas Esperanton. Tutdekstre oni vidas parton de la IEL-stablo kun invito aliĝi. — (Fotaj H. W. Holmes.)

13-

001

Ankoraŭ el alia vidpunkto la 30-a estis vere sukcesa: oni malmulte aŭdis dum ĝi naciajn lingvojn, sed ĉiuj kongresanoj, eĉ la komencantoj, kvankam en ĉi tiu kongreso la plimulto de l' partoprenantoj estis angloj kaj skotoj, klopodis paroli nian lingvon internacian, — kaj tio signifas vere tre altan laŭdon por niaj britaj gastigintoj, ĉar en pluraj ĝisnunaj kongresoj ni havis tute malsaman sperton, malpli kontentigan.

Generale niaj britaj geamikoj montris sin de sia plej plaĉinda flanko, kaj tiel okazis ke la partoprenantoj de la 30-a sentis sin bone en tiu ĉi kongreso kaj volonte rememoros ĝin kiel unu el la plej sukcesaj, kiujn la Esperanto-movado ĝis nun spertis. Ni havis kongresojn pli multnombro vizititajn, kongresojn pli impone aranĝitajn laŭ iuj vidpunktoj; sed kio al la 30-a donis ĝian specialan noton, tio estis la konkorda kunlaborado, la harmonia sento, la vere esperantista atmosfero, kiu regis en ĝi de la komenco ĝis la fino. Tial, kiel « la harmonia kongreso », ĝi restos por ĉiam enskribita en la historio de nia movado.

Sabato

Unua vojo --- al la Kongresejo.

El la hotelo, la unua vojo en la granda urbo estas al la Kongresejo. Komprenoble! Ĝi estas en distanco de kelkaj minutoj, ĉirkaŭ du anguloj. Fakte, ŝajnas, ke parto de la kongresejo per sia dorso eĉ tuŝas la straton, en kiu estas mia hotelo; sed ne estas enirejo tie. La kongresejo troviĝas en la *University College* (Universitata Kolegio, t.e. la Universitato de Londono), en regiono kie hoteloj ĝuste abundas, kaj do preskaŭ ĉiuj kongresanoj povis esti loĝigataj proksime de la kongresejo.

Impona fasado, laŭ aspekto de greka templo. Frontona tegmento ripozanta sur dek potencaj kolonoj. Supre kupolo.

Larĝaj ŝtuparoj kondukas al la «templo». Sed ne per tiuj ŝtuparoj supreniras la esperantistoj. Estas malpli granda ŝtupareto, kaj pli modesta pordo dekstre de la ĉefenirejo, laŭ kiuj ni atingas la interon de la kongresejo.

Antaŭ la konstruaĵo troviĝas razenoj, ĝardenaĵoj, kaj placo por starigi aŭtomobilojn kaj taksiojn. Ne estas videbla verda flago; sed super la ĉestrata enirejo al la antaŭkongreseja placo (ĉe Gower Street) indikas granda transparento ke en tiu ĉi kolegio okazos en la venontaj tagoj la « 30a Universala Kongreso de Esperanto ».

Enirinte la kongresejon, oni venis maldokstren en salanon, kiu bone taŭgis kaj estis uzata kiel Akceptejo, kaj rekte antaŭen oni atingis grandan halon, kie estis aranĝita la kongresa librejo, riĉe ekipita, de la Brita Esperantista Asocio. Tie la rigardon altiris ankaŭ efika stando

de la Berna LKK, kie deĵoris i.a. svisa samideanino en nacia kostumo: oni povis jam subskribi sin kiel partoprenanto por la 31-a U.K., kaj oni povis tie ricevi la unuan numeron de la Berna kongresgazeto, tre belajn esperantlingvajn prospektojn kaj la gajimpresajn multkolorajn glumarkojn de la venonta kongreso. Ankoraŭ en ĉi tiu halo troviĝis la Banko kaj diversaj aliaj standoj. Tuj apude en aparta ĉambro, iom malgranda, funkciis la kongresa Poŝtoficejo — cetere, kiel kutime, kun aparta kongresa stampo.

Preter la poŝtoficejo oni atingis la Ripozejon, agrable malvarmetan lokon, kun tre komfortaj foteloj, preskaŭ tro komfortaj, ĉar ili facile povus sugesti al la konresanoj, ke ĉi tie ili fartas pli bone ol ŝvitante en varmegaj kunsidoĉambroj. Estis vico da aliaj salonoj, kiujn oni uzis por la fakkunvenoj; sed por atingi ilin, oni devis iaforte longe serĉi kaj multe kuri tra senfinaj koridoroj, laŭ ŝtuparoj ktp. Komprenoble, embarason oni sentis en la unua tago; poste oni jam al kutimiĝis kaj facile trovis ĉion.

Estis ankaŭ bufedejo, kie oni povis ricevi modestajn trinkaĵojn kaj manĝetojn. Kaj estis, trans korto, tiel nomita « Granda Salono » por la laborkunsidoj kaj diversaj aliaj kongres-aranĝoj, tamen ne tre granda, kaj iom simpla, sed tute sufiĉanta.

La solenaj aranĝoj: Malferma Kunsido, Diservo, Balo, Koncerto, kaj la teatra prezentado okazis, kiel kutime, en specialaj konstruaĵoj taŭgaj por tiuj specialaj celoj.

Komprenoble, ni vizitis unue la Akceptejon, por preni niajn kongresajn dokumentojn. Ni estis inter la unuaj, kaj ni tuj ricevis niajn kovertegojn kun enhavo de ĉio bezonata kaj de multo utila. Sed mi aŭdis, ke ankaŭ poste, kiam la alvenintaro pli multnombro invadis la akceptejon, ĉio funkciis tre glate kaj rapide.

Mi atentigu ĉi-loke, ke la Kongreslibron oni estis ricevinta jam kelkajn semajnojn antaŭe, kaj ke do hejme oni havis sufiĉe da tempo por trarigardi kaj trastudi ĝin. Kvankam ĝi estis nur libreto 32-paĝa, ĝi estis tiel praktike aranĝita kiel eble neniu el ĝiaj antaŭuloj. Estontaj kongresoj tion imitu!

El la Kongreslibro por la 30-a oni povis jam multon ekscii antaŭ la kongreso. Ekzemple, oni sciis el ĝi, ke la 30-a Universala Kongreso okazos *sub patroneco de Lia Princa Moŝto la Duĝo de Connaught*, de *Lia Moŝto Viscount Leverhulme*, de *Lia Moŝto Sir Harry Twyford*, kiu estas la Lord-Urbestro de Londono, de *Lia Moŝto John Sporni*, Urbestro de la Londona distrikto St. Pancras, kaj de aliaj famaj gemoŝtuloj, inter ili kvar universitataj profesoroj. Oni sciis la nomojn de la Organiza Komitato

(LKK). Oni antaŭe sciis, kiamaniere, alveninte en Londono, oni plej facile el la ĉef-stacidomoj povos atingi la kongresejon kaj la hotelojn; oni estis informita pri la iom komplika por eksterlandanoj angla monsisistemo, pri restoracioj, vidindaĵoj ktp., kaj iom eĉ pri la angla lingvo. Bedaŭrinde ne ĉiuj kongresanoj antaŭe trarigardis la libreton, kaj tiel okazis en la akceptejo ankoraŭ cent demandoj kaj informpetoj necesaj — sed la respondoj estis ĉiam donataj volonte kaj ĝentile. Almenaŭ mi ne vidis dum la tuta kongreso en la kongresejo eĉ unu deĵoranton aŭ deĵorantinon, kiu ne estus, se petite, ĉiumomente kun afabla rideto je la dispono de iu el la kongresanoj. Ĉi-riate oni ankaŭ ne aŭdis akrajn vortojn, aŭ eĉ insultojn, kiel okazis dum iuj antaŭaj kongresoj, kiam — pro netaŭga preparo, aŭ pro nesufiĉaj deĵorantoj — homoj kelkfoje nervoziĝis kaj ekscitiĝis. La tuta kongreso spiris, tiel dire, atmosferon de bonvolo kaj komplezo, kaj de vera interkonsento kaj harmonio. Eĉ la laboristaj samideanoj britaj kunlaboris por ĝia sukceso. En sia organo ili publikigis bonvensaluton ĉefloke, kaj ili oficiale reprezentigis sin ĉe la Malferma Kunsido.

Interkonatiĝa Vespero.

Povas ŝajni nekredible, sed — mi preskaŭ ne plu memoras pri la Interkonatiĝa Vespero, kiu okazis sabaton vespere en Wharcliffe Rooms, Great Central Hotel. Verŝajne mi estis tute okupita, interparolante kun malnovaj geamikoj kaj farante konatiĝon kun novaj. Nur tiom mi memoras ke la ejo estis vere luksa, ke la vesperon honoris per sia ĉeesto la urbestro de St. Pancras, s-ro *John Sporni*, kun sia edzino; ke s-ro *A. C. Oliver*, kasisto de BEA kaj estrarano de IEL, salutis la geurbestrojn, ke la urbestro respondis tre afable en angla lingvo (li diris ke li komprenis 90% el la vortoj de s-ro Oliver, ke li opinias Esperanton afero altgrade subteninda, kaj ke li deziras al la esperantistaro sukceson post sukceso). La salutparolon de la urbestro tradukis s-ro *Butler*, kaj s-ro *Buchanan*, prezidanto de BEA, dankis al la urbestro pro la afablaj vortoj.

Dimanĉo

La Malferma Kunsido.

Muĝaj sonoj de orgeno nin akceptas, kiam ni eniras la Dominion-Teatron, por ĉeesti la solenan inaŭguron de la 30-a. La belega salono kaj la muziko tuj kaptas nian animon, metante ĝin en solenan humoron de atendado je io venonta granda.

Disiĝe leviĝas la ruĝa kurteno. Antaŭ malhela fono de la scenejo, ornamita



El la Trideka: Kion la foto-kamero okaze kaptis.

Supre maldekstre: La Prezidanto de IEL, s-ro int.-generalo Louis Bastien, en pozo tute ne-oficiala. — Supre dekstre: La Urbestro de Londona distrikto St. Pancras, s-ro John Spérni, kun sia edzino kaj kelkaj gesamideanoj, sur la antaŭplaco de la Kongresejo. — Malsupre maldekstre: La Prezidanto de la Esp. Akademio, s-ro Isbrücker, interparolante kun fervora samideano. — Malsupre dekstre: Nia redaktoro; la ĉarma edzino de la fotografinto; s-ro Oliver; s-ro Malmgren. (Fotografis: Durrant.)

per du grandaj verdaj standardoj kun la kvinpinta stelo, reliefigas en brila lumo la figuroj de la IEL-Estraro, kune kun la honorindaj moŝtoj la urbestro de St. Pancras kaj lia edzino. Tri mil manoj el ĉiuj rangoj kaj balkonoj de la teatro aplaŭdas fervore kaj entuziasme. Ĉiu sentas en tiu ĉi momento denove en sia interno la misteron de io belega, grandioza: Ĉi tie ni kunvenis, mil sescent homoj el tridek nacioj, homoj tre diversaj laŭ religio, raso, politika konvinkigo, profesio, klaso, klero, kaj tamen nin ĉiujn plenigas nun la penso, la fervoro pri unu Afero, unu Ideo, unu Lingvo Internacia.

Starante en respekto ĉiuj aŭskultas la britan himnon: *God save the king* (Dio protektu la reĝon).

Kaj ekparolas la blankhara prezidanto de IEL, s-ro intendanto-generalo Louis Bastien, tondre aplaŭdata de la ĉeestantaro. Li esprimas saluton kaj dankon al la granda lando, al la granda brita popolo, kiu akceptas nin hodiaŭ. Li rememorigas pri la Kembriga Kongreso, kiun li ĉeestis, kaj pri la tiamaĵ vortoj de la majstro, kiuj povus esti dirataj hodiaŭ senŝanĝe, kun sola escepto de la nomoj. Li memorigas ankaŭ pri niaj gefratoj, kiuj ne plu povas soleni kun ni tiun ĉi belegan feston. Li esprimas sian respekton al D-ro Zamenhof kaj saluton al niaj gastigantoj.

Poste s-ro Bastien proponas la jenan Kongresan Estraron: Prezidanto Fred Wadham; Vicprezidantoj s-roj Harald Thilander, George D. Buchanan kaj Er-

nest Archdeacon; Sekretario Cecil C. Goldsmith; Helpsekretarioj f-ino Renée Rivollet, E. W. Amos kaj f-ino Eileen Goldsmith. (Aplaŭdoj.)

Transprenas la prezidon s-ro Fred Wadham, la ĉefredaktoro de *The British Esperantist*, kaj direktas al la kongresanoj la jenan paroladon:

Kiel humila reprezentanto de viaj gastigantoj, la brita esperantistaro, oni faris al mi la grandan honoron, difini min por la devo malfermi la Tridekan Universalan Kongreson. Kun tiu agrabla devo estas ligita la privilegio fari paroladon. Por tio, tamen, nia estraro saĝe difinis deklinutan templanon. Por doni bonan ekzemplon al postaj parolantoj, mi intencas severe respekti tiun limon, kaj tial mi rezignas je retorikaj floroj. Vi do pardonos al mi, se tion, kion mi havas por diri al vi, mi diros tute simple kaj sen ornamo, kaj vi bonvolos kredi, ke tiu simplecon akompanas ĝia natura frato, la sincereco.

La organizintoj de la kongreso, kaj la Londona esperantistaro ĝenerale, kore salutas kaj bonvenigas vin, reprezentantojn de tridek nacioj. Aparte ni bonvenigas tiujn delegitojn, kiuj reprezentas siajn registarojn, kaj ni dankas ties sendintojn pro ilia praktika monstro de intereso pri nia afero.

Salutinte la ĉeestantojn, mi dediĉas mian duan vorton al tiuj, kiuj ne povas partopreni la nunan manifestacion. Multaj el niaj samideanoj kaj kunbatalantoj, egale fervoraj kaj laboremaj kiel ni pli feliĉaj homoj, volonte estus kun ni hodiaŭ, se ne malhelpus ilin diversaj cirkonstancoj ekster ilia regado: jen la granda distanco, jen la internaj cirkonstancoj de la hejma lando, jen la kondiĉoj rilate al deviso, aŭ jen tute simple la propraj ekonomiaj cirkonstancoj. Ni povas tamen esti certaj, ke ili partoprenas kun ni spirite, se ne korpe, kaj ni kalkulas ilin inter nia ĉeestantaro. Ili sciu, ke ne vidante ilin ni tamen ne forgesas ilin, kaj ne malŝatas la kontribuon, kiun ili faras al nia afero, ĉiu laŭ sia eblo.

Ĉe niaj Universalaj Kongresoj ĉiam okazis, ke el la proksimaj landoj venis multaj delegitoj, kaj el la malproksimaj malpli granda nombro. En la nuna stato de la mondo, espereble ne longe daŭranta stato, nepre okazas, ke el landoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj kaj valutaj malpermesoj venas malmultaj kongresanoj, kaj el la landoj, en kiu Esperanto estas malfavore rigardata, nur unu-du, aŭ eĉ neniu. Tiu malduala proporcio erarigu nek nin, nek la publikon, pri la relativa subteno en la diversaj landoj, kaj ni klopodu ĝustigi la ekvilibron por la okuloj de la mondo. Venintoj el la landoj multnombro reprezentataj sin tenu plej modeste, kaj lasu la lumon fali sur tiujn, kies landoj sendis malmultajn delegitojn. Al ĉi tiuj, venintoj nur malfacile kaj kun granda sinofero al nia kunvenego, ni donu des pli grandan honoron; al ili ni dediĉu la tutan gastamon, kiun ni volonte montras al iliaj malpli feliĉaj samlandanoj, kiuj, ne pro kulpo propra, forestas. Al niaj samideanoj en la « mallumaj landoj » mi esprimas en via nomo saluton kaj kuraĝigon, kaj certigon pri nia kora kunsento.

Antaŭ nemultaj tagoj aperis artikolo pri la karmemora D-ro Zamenhof en Londona gazeto dediĉata al la interesoj de liaj samgentanoj, kaj la verkinto skribis, interalie: « Li ja kreis lingvon, lingvon kiu ankoraŭ hodiaŭ vivas. Sed ĝia spirito velkis. Ĉu nun en ĉi tiuj mallumaj horoj, kiam milito kaj murmuroj pri milito pelas malfortajn mensojn al detruado, kaj fortajn homojn al malespero, ĝi releviĝos ĝis la alteco, kiun konceptis ĝia aŭtoro? »

Jen defio por ni, gesamideanoj! Dum nia kongreso ni pruvu per vortoj kaj ago, ke la spirito Zamenhofs ankoraŭ forte ardas en ni kaj inter ni, kaj ke, kiel ĉe la Unua Kongreso antaŭ tridek-tri-jaroj, « kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj ».

Aparte mi ĝojas, ĉar mi havas la honoron prezidi kongreson, kiu staras komplete sub la devizo: **Unueco estas Forto!** Rigardante la tagordon de niaj aferkunsidoj, oni rimarkas ke, unuafoje en longa vico da jaroj, la « organiza demando » jam ne havas lokon en ĝi. Fine ni povos dediĉi nian plenan forton al la progresigo de nia afero, ne perdante tempon kaj energion pro diskutoj pri la maniero de nia kunlaborado. Longe vivu la nove trovita unueco de la neŭtrala Esperanto-movado sub la standardo de Internacia Esperanto-Ligo.

Via Organiza Komitato sekvis la tradicion, provizi kiel eble plej grandan diversecon en la kongresa programo. « Kiom da kajoj, tiom da ĉapoj » estas vera ankaŭ pri la esperantista popolo, fidela spugulo de la vasta publiko, el kiu ĝi estas ĉerpita, havante diversajn gustojn, diversajn talentojn, diversajn konceptojn. Kiel decas ĉe libera, demokrate ordigita popolo, al ĉiu individuo estu permesate partopreni la seriozajn kaj la amuzajn partojn de la kongreso laŭ tiu mezuro, kiun diktos al li la inklino ligita kun la devosento. Ni insistu nur, ke ĉiu, kiun ajn parton li prenos en nia manifestacio, prenu tiun parton fervore kaj kun tuta koro. Ni havas antaŭ ni unu semajnon da vivo esperantista. Ni travivu ĝin komplete kaj senrezerve.

Komenciĝas la Trideka Universalaj Kongreso de Esperanto. Sukceso kronu ĝian laboron!

Simple kaj klare sonis la vortoj de la kongresa prezidanto, sed ili tuŝis la koron de ĉiuj. Konsekvence oni ne ŝparis aplaŭdojn. Cetere la prononcado de s-ro Wadham estas modela, per ĝi oni apenaŭ rimarkas ke li estas brito.

Prenas la parolon Lia Urbestra Moŝto de St. Pancras (la Londona distrikto, en kiu troviĝas la Kongresejo) s-ro John Spérni. Li esprimas sian plezuron ke li denove havas la okazon saluti nin. La Londonanoj (li diras) rigardas la akcepton de sia urbego kiel kongresloko gran-

da honoro; Londono estas ja kosmopolita urbeĝo. Nuntempe ekzistas en la mondo grandaj diferencoj kaj malpacoj, sed Esperanto povos helpi forigi ilin. Espereble iam venos tempo, kiam homoj per neŭtrala lingvo rekte komprenos unu la alian. Antaŭ nelonge estis malmultaj esperantistoj en la mondo, sed nun jam estas multaj. Hodiaŭ aŭdinte britojn paroli Esperanton tiel bone, li (urbestro) kredas ke ankaŭ ĉinoj povas lerni la lingvon. Kiel urbestro li interesiĝas precipe pri la eduka flanko de la afero, kaj li opinias ke Esperanton oni devos enkonduki en la lernejojn. Povas esti diferenco de opinioj, li diras; sed li ne kredas ke Esperanto malutilas al la nacio sed ke, ju pli multajn lingvojn oni lernas, des pli bona civitano oni estas. Kaj li kredas nepre ke *Esperanto venis por resti!* Kiel urbestro de St. Pancras li estas preta subteni la klopodojn de l' esperantistoj, kaj en taŭga okazo ili konfide sin turnu al li.

La urbestro parolis anglalingve, kaj en la fino esperantlingve deziris al la kongreso ĉian sukceson. Lian paroladon poste resumis la kongresa prezidanto.

Parolas nun la reprezentantoj de diversaj Registaroj, kaj nome unue Lia Ekscelenco la Ambasadoro de Svislando, s-ro Paravicini, kore invitante la kongresanojn kaj la tutan esperantistaron al la 31-a Universala Kongreso, okazonta venontjare en Bern.

Nome de la brazila Registaro salutas s-ro Caio Mello de Franco (franclingve; tradukas P. Petit).

Kiel reprezentantino de la belga Instrua Ministerio parolas f-ino A. Jennen.

Universitata Profesoro Fréchet salutas en la nomo de la franca Eduka Ministerio, kaj s-ro Couteaux nome de la franca Ministro de PTT kaj Radio, s-ro Jullien.

S-ro Isauro Alvarez transdonas salutojn de la hispana Ministerio por Popola Edukado.

Sekvas s-ro L. Alseika, nome de la litova Ministerio de Agrikulturo; s-ro Isbrücker, nome de la nederlanda Ministerio de Instruado; kaj s-ro Sletteród, nome de la norvega Registaro.

Nome de la Nansen-Komitato por helpo al senŝtatoj parolas s-ro Arnfinn Jensson.

Sekvas la salutojn de reprezentantoj de la Landaj Asocioj, aliĝintaj al IEL: por Reĝa Belga Ligo Esperantista s-ro Kempeneers; por Brita Esperantista Asocio s-ro Clayton; por Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko s-ro Heikewälder; por Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakio s-ro Bruno Gahler; por Centra Dana Esperanto-Ligo s-ro Justesen; por Societo Franca por la Propagando de Esperanto s-ro Archdeacon; por Jugoslava Esperantista Ligo s-ro Lapen-



El la Trideka.

Supre kaj malsupre: Naciaj kostumoj neniam mankas dum nia Mondkongreso. — Meze: Malgraŭ la varmeĝo la gekongresanoj estas bonhumoraj — kelkaj gesamideanoj kun esperantlingva afiŝo de « Evening News » (« Estas diable varme ») kaj kun gazetvendisto. — Fotoj (supra): Alvarez; (malsupra): Chipperfield.

na; por Litova Esperanto-Asocio f-ino B. Dvarionaite; por Nederlanda Esperanto-Asocio LEEN s-ro Grolleman; por Norvega Esperanto-Ligo f-ino Rosa Bye; por Pollanda Esperanto-Delegitaro s-ro Toczyski (legas leteron de Prof. Bujwid); por Sveda Esperanto-Federacio s-ro Einar Dahl; por Svisa Esperanto-Societo s-ro Schild; por Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko s-ino Eby.

Rimarkinde estas ke el ĉiuj salutintoj la plej multajn aplaŭdojn rikoltis la du diversnaciaj (ĉeĥa kaj sudetgermana) reprezentantoj el Ĉeĥoslovakio kaj la reprezentanto de Hispanujo, — signo ke ankaŭ la esperantista popolo kun vigla intereso sekvas la aktualajn okazaĵojn en la mondo.

Sekvis ankoraŭ aliaj salutoj: por Lin-

gva Komitato s-ro Isbrücker; por Aŭstralio s-ino Hanks; por Brita Laborista Esperanto-Asocio s-ro Thompson; por Bulgarujo s-ro Stoyan Djoudjeff; por Flandra Ligo Esperantista s-ro Gerard de Boes; por Irlando s-ro Lorcán Ó hUiginn; por Kanado s-ro Elven Bengough; kaj por Rumanujo s-ro Pragano.

Post mallongaj paroloj de s-roj Wadham kaj Oliver, kaj du anoncetoj de s-ro Goldsmith pri tagmanĝo kaj gazetfotografisto, la Malferma Kunsido estas fermata je 12.45 h. per kantado de « La Espero ».

Komuna Tagmanĝo kaj Kongresa Diservo.

Stomako kaj animo estas du aferoj tre malsimilaj. Tamen ne tute sendependaj unu de la alia.

Post la Malferma Kunsido, la kongresanoj iris unue komune tagmanĝi — por mil personoj estis loko en la dua-etaĝa « Mountview Café » de Lyon's Oxford Corner House, la ceteraj devis kontentiĝi per la ter-etaĝa restoracio aŭ per la kel-etaĝa « Brasserie » de la sama entreprenego.

Kiel sciante, ekzistas Esperanto-klubo ĉe la gekelneroj de Lyon's. Kompreneble, pro tio, ke Lyon's havas centojn da geokupitoj en diversaj filiaj restoracioj, estis preskaŭ hazardo, renkonti la esperantistojn inter ili. Tamen trifoje dum la kongresa semajno mi efektive renkontis Esperanto-parolantajn kelnerojn, unu el kiuj parolis eĉ tre bone.

Nu, la komuna tagmanĝo estis kvankam sufiĉa, sed ne tro ampleksa, kaj rapide surtabligita (jen laŭdo por Lyon's-servado), kaj sekve kun admirinda akurateco tute ne kutima — minimume duonhoron tro frue — la pli multaj kongresanoj jam aperis ĉe la City Temple, kie devis okazi la Kongresa Diservo (protestanta).

Estas citinde ke samtage en la mateno katolikaj kongresanoj, laŭ indiko en la Kongreslibro, povis ĉeesti meson en la preĝejo de Sankta Anselmo, ĉe Kingsway.

City Temple estas bela, digna preĝejo. Diservis en ĝi multaj famaj pastroj. Ankaŭ Baha-u'llah jam predikis tie.

La Kongresan Diservon kaj predikon faris pastro W. J. Downes; orgenludis Martin Fearn. Ĉiu kongresano estis ricevinta, kun la kongresaj dokumentoj, presitan « Ordon de Diservo », laŭ kiu oni povis precize sekvi la preĝojn kaj himnojn. El la Biblio laŭtleĝis f-ino M. Saxl kaj pastro T. W. Roff; solkantis s-ro Leonard Ward.

★

Post la diservo oni estas libera por la resto de la dimanĉo. Agrabla sento. Do, oni povas laŭplaĉe kun kelkaj amikoj-samideanoj vagi tra la urbeĝo, babilu, trinki kafon (kiu estas malbona) aŭ teon

(kiu estas tre bona), se oni trovas malfermitan refreŝigejon, aŭ suĉi iun glaci-igitaĵon — ĉar estas varma vetero, kaj pro la multa babilado oni ĉiam estas soifanta.

Kaj tiujn okupojn — promeni, babili, trinki, suĉi, kaj foje iom manĝeti — oni plenumas dum la tuta posttagmezo, ĝis la vespero, ĝis la enlitiĝo je noktomezo, vere...

Lundo

Unua Laborkunsido:

Niaj mortintoj kaj kvazaŭ-mortintoj. — La nepra neŭtraleco de IEL; sed por sukcesigi nian aferon, necesas kunlaborado de ĉiuj. — La stato de IEL. — La estonteco dependas de nia laboro.

Dum la unua nokto en Londono, de sabato al dimanĉo, kredeble ne ĉiu dormis tiel bone, kiel li (aŭ ŝi) kutimis dormi hejme en la propra lito. Sed la duan nokton oni jam al kutimiĝis, kaj en la lunda mateno oni aperas satdorminta kaj tutfreŝa en la Granda Salono de l' Kongresejo, por ĉeesti la Unuan Laborkunsidon de la Trideka.

Sur la podion venas la prezidanto de IEL, generalo Bastien, kun kelkaj fideluloj el la liga estraro. Antaŭ la podio troviĝas larĝa tablego, ekipita per inko, plumingoj kaj paperfolioj. Oni bone zorgis por eventuala ĵurnalistaro.

La kunsido devis komenciĝi je la 10-a horo. Sed en Londono oni sufiĉe akurate atentis la « akademian kvaronhoron ». Tiel oni komprenas la saluton de generalo Bastien en tiu ĉi laborkunsido:

Karaj gesamideanoj! Ĉar estas akurate la 10-a kaj 18 minutoj, mi malfermas la Unuan Laborkunsidon de IEL.

Sed (daŭrigas la generalo serioziĝante) antaŭ ol komenci tiun laborkunsidon, permesu ke mi memorigu pri la gamikoj mortintaj dum la pasinta jaro.

Starante la ĉeestantoj aŭskultas la nomojn: s-ino Borel, s-ro Holmes, s-ino Vatré-Baudin, s-ro Hamann, s-ro Briggs, D-ro Spielmann, f-ino Bartholemew, Prof. Prelato Dombrasukas, s-ro Quirino d'Oliveira; krome tiuj, pri kiuj oni ne legas en la gazetoj, sed kiuj ankaŭ entuziasme laboris. (Silentado.)

Aliaj fervoraj esperantistoj (daŭrigas s-ro Bastien) estas kvazaŭ mortintaj por nia movado. Antaŭ du jaroj ni perdis la germanojn, nun ni perdis la aŭstrojn. Multaj el ili estis jam preparintaj sin ĝoje por viziti tiun ĉi kongreson en Londono, sed ili nun mankas. Tamen nia afero estas io tro granda, ol ke iuj batoj kontraŭ ĝi povus ruinigi ĝin. Cirkonstancoj ŝanĝiĝas konstante. La praktikaj rezultoj helpas plej bone por reliberigi tiujn samideanojn. Al ili mi do ne diros: Adiaŭ!, sed: Ĝis la revido!

Hieraŭ mi memorigis pri la parolado de D-ro Zamenhof okaze de la inaŭguro de la Kembriĝa Kongreso. Hodiaŭ mi memorigu alian citaĵon el la sama parolado, nome kie la majstro parolas pri la celoj de niaj kongresoj.

Ĉu ni kunvenas (demandis D-ro Zamenhof) por fari manifestacion kaj sekve propagandon? Jes, certe! Sed ĉar el cent kongresanoj almenaŭ naŭdek-naŭ havas de Esperanto nur *m o r a l a n* profiton, por kio do ni ĝin propagandas? Mi ne dubas, ke la plimulto el vi donos al ni nur unu respondon: Ni faras manifestacion kaj propagandon por la Esperantismo ne pro ia utilo, kiun ĉiu el ni persone povas havi de ĝi, sed pro tiu gravega signifo, kiun la Esperantismo

havas por la tuta *h o m a r o*, pro tiu komune-homa celo, kiu nin, aktivajn esperantistojn, altiris al Esperanto; ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la Esperantismo en si enhavas.

La admirindaj vortoj de la majstro ŝvebu super ni nun kaj en ĉiuj estontaj kongresoj.

Oni timis pri la internacieco de IEL; sed tiu timo ne estas necesa. Ĉiu nacia asocio havas en IEL sian vorton, sian influon, kaj la informiĝo tiamaniere fariĝas pli rapida, ol se oni demandus ĉiun apartan esperantiston.

Krom la landaj asocioj ni akceptas ankaŭ *individuaĵajn membrojn*, kaj tiel IEL estas la ĝenerale taŭga organizo por la neŭtrala esperantistaro.

Ekzistas, krom la landaj asocioj, la *fakaj asocioj*, kiuj faras Esperanton utila por la samideanaro. Ankaŭ kun ili IEL faras interkonsentojn.


Ĉu tiamaniere nia neŭtrala organizo estas vere kompleta? Ne! Mankas ankoraŭ tiuj, kiuj ne komprenas la situacion aŭ kiuj estas nebone informitaj. Iam ankaŭ ili komprenos ke « Unueco estas Forto », ke « Diseco estas Pereo ». Tiam ni ĝoje akceptos ilin, kaj tiam la verda familio estos vere kompleta.

Sed Esperantujo estas jam granda nacio, en kiu ekzistas diversaj familioj. Krom la neŭtrala, ekzistas aliaj organizoj, ne-neŭtralaj. Kun ili ni povas kunlabori. Sed en tio ni devas agi prudente, singarde. *Nia neŭtraleco estas nia forto!* Ni ne estas politike, religie, ekonomie ligitaj. Tial nia movado ne povas esti suspektinda; ĝi devas taŭgi por ŝtatoj demokrataj kaj aŭtokrataj. Tio ne signifas ke ni devus ignori la ne-neŭtralajn. Ili uzas la saman rimedon kiel ni, kaj propagandas por ĝi. Do, en difinitaj okazoj ni certe povas, eĉ devas, kunlabori kun ili. *Se ni volas atingi grandajn sukcesojn, ne sufiĉas frapi, ne sufiĉas frapi laŭte kaj multfoje, sed ni devas frapi ĉiuj samtempe.* Tio validas ekzemple por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Tiel la konstrua laboro estos finita. Unu neŭtrala asocio, kiu enhavas landajn asociojn kaj individuajn membrojn, kiu interkonsentas kun fakaj kaj kunlaboras kun ne-neŭtralaj asocioj. Jen fleksebla organizo.

Ĝi tamen havas malavantaĝon — ne por la membroj, sed por si (IEL): mem: la malalta kotizo fiksita por la asociaj membroj ne sufiĉas por kovri la administrajn kostojn. Tial IEL bezonas ke ĉiuj, kiuj povas, fariĝu membroj individuaj aŭ eĉ abonantaj.

Sed ne nur monon ni bezonas, ankaŭ



(Wranka)

Generalo Bastien (invitante la esperantistaron, preni lokon en la aŭtobuso de IEL): Rapidu, gesinjoroj, se vi volas frue atingi la celon! Ni tuj ekiros. Restas ankoraŭ kelkaj lokoj liberaj. Ne bedaŭru poste, se vi ne ĝustatempe aliĝis!

multan fervoron! Ofte oni aŭdas, ke ni ne sufiĉe progresas. Sed ĉu ni ne devas ekzameni, ĉu fakte ni mem faris ĉion, kion ni povas kaj devus fari? Kaj, dum tiu ĉi semajno, ĉu ni ne pritraktu ĉefe tiun temon, *ĥiamaniere ni multobligu la esperantistojn*, kaj precipe ankaŭ tiun temon, *kiel enkonduki Esperanton en la lernejojn?* Efektive, tio estas la ĉeftemoj de nia kongreso.

Oni riproĉis, ke en la universalaj kongresoj oni ne plu multe parolas pri la « interna ideo », pri la verda standardo. Sed estas ja pli grave, senti tion en la koro ol havi ĝin ĉiumomente sur la lipoj. Multaj kursanoj forkuras post la unuaj lecionoj. Kiuj restas, estas tiuj kiuj sentas en sia koro ke Esperanto donas profiton malpli nuntempe al unuopaj personoj, sed pli vere estonte al la tuta homaro. Tiuj restantoj estas nia elito!

Sed eĉ poste, kiam Esperanto fariĝos komuna bono de ĉiu, ĉu tiam perdiĝos la « interna ideo »? Ne! Same kiel la interna ideo disvastigis Esperanton, same tiel Esperanto tiam disvastigos la internan ideon. — « Esperanto pro la interna ideo! » jen nia devizo; « Interna ideo per Esperanto! » jen nia espero!

Sekvas *nova vico da salutoj* de tiuj, kiuj ne povis ĉeesti aŭ saluti en la Malferma Kunsido: por Hungarlanda Esperantista Societo parolas s-ro Elek Tolnai; por Kataluna Esperanto-Federacio Prof. Delfi Dalmau; nome de la Prezidanto de Ĉeĥoslovaka Respubliko D-ro Beneš kaj de grand-industriisto Johano Bata salutas en nacia kostumo s-ro J. Geryk; s-ro Holmes legas salutleterojn de brazila pioniro Ismael Gomes Braga kaj de « Holliday Fellowship »; por Frat-eĉa Esperanto-Movado salutas s-ro Vertener; por la Nacia Societo de Instruistinoj en Anglujo f-ino Waite; por Skolta Esperantista Ligo s-ro Moll.

S-ro Goldsmith legas diversajn leterojn kaj telegramojn: de D-ro Adam Zamenhof, kiu origine intencis ĉeesti la kongreson; de f-ino Lidja Zamenhof el Usono; de C. Walter, Berlin; de skoltaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio; de E. Olsvanger, Jerusalemo; de D-ro Buchli, Bern; de s-ro Chmielinski, ĉefdelegito de IEL en Polujo; de Lluis Companys, prezidanto de la « Generalitat de Catalunya »; kaj de I. P. E.

Sekvas la raporto de s-ro Goldsmith, ĝenerala sekretario de IEL, pri la laboroj kaj la stato de la Ligo:

Post la Varsovia Kongreso IEL daŭrigis la varbadon de membroj kaj delegitoj, kaj eldonis suplementon. Ni esperas, ĉiujare eldoni suplementon en aŭtuno. La venonta suplemento supozeble enhavos, krom ŝanĝojn pri la delegitoj, ankaŭ raporton pri la 30-a.

Bedaŭrinde ni atingis ne tiom da membroj, kiom ni esperis. Tamen la nombro montras ke ni havas la subtenon de la

granda plimulto de l' esperantistaro. Grandan intereson vekis la Internacia Konkurso 1937, kiu estis bazita sur la stato de 1935. La premion de dek anglaj funtoj gajnis la Norvega Esperantista Ligo, kiu sukcesis plibonigi sian staton je 660 %.

La prezidanto, s-ro Bastien, uzas la okazon por transdoni belan diplomon al f-ino Bye, la reprezentantino de NEL: Kun granda plezuro mi donas al vi tiun ĉi ateston, kiun via landa asocio per sia modela laboro meritis. Se ĉiu lando sekvas NEL-on kaj sesobligas sian membraron, la venontan jaron ni havus 80.000 IEL-anojn. Norvegujo bonege laboris. Tio estu ne nur kuraĝigo por tiu lando sed precipe ankaŭ ekzemplo por aliaj landoj. Do, honoron al Norvegujo, honoron al NEL!

F-ino Bye en la nomo de NEL eldiras koran dankon pro la granda honoro: Ni efektive laboris, do ni estas ĝojaj. Tiun ĉi diplomon ni bone gardos, kaj ni promesas daŭrigi nian laboron. Kaj ni deziras diri al ĉiuj: Neniam laciĝu! Ĉiam pli antaŭen al la venko! Kiel diris la majstro: « Ni paŝo post paŝo, post longa laboro atingos la celon en gloro! »

S-ro Goldsmith daŭrigas sian raporton: Tiu konkurso kaŭzis tiom da intereso, ke ni aranĝis duan konkurson por 1938. Nun en la unua vico staras Jugoslavio, Bulgarujo kaj Svislando. Bedaŭrinde ni finis la jaron per granda deficitio. Ĉiu komprenos la malfacilaĵojn de unua

jaro, tamen la deficitio estis tro alta. Feliĉe ni havis bonajn subtenantojn.

La laboro de la Centra Oficejo estis ampleksa. En 1937 ni ricevis pli ol 7000 korespondaĵojn, kaj forsendis pli ol 15000; entute ĉ. 22500 sen la gazetoj, do ĉiutage ĉ. 75, sed lastatempe, pro la kongreso, pli ol 100. Ni klopodis, laŭeble respondi en la tago de ricevo.

La reto de l' delegitoj regule kreskas. La jarlibro por 1938 montras 1319 delegitojn, nun estas jam pli ol 1400; sed ni deziras havi minimume 2000. Tamen oni akceptu oficon de delegito ne nur pro la nomo, sed ĉefe por fari servojn.

Krom la ordinara laboro, grava estis la laboro por la kongreso. Ĉu ni ĝin bone faris, tion vi decidu post la kongresa semajno. Ni sukcesis akiri la kunlaboradon de kelkaj gravaj firmoj: 1. Ĉe la Magazenego *Selfridge* f-ino Saxl donis kursojn por ĉ. 80 personoj; la partoprenintoj starigis propran klubon, kaj la firmo eldonis belan broŝureton kaj dum la kongreso elmontras Esperanto-ekspozicion. — 2. Ankaŭ ĉe *Lyon's Oxford Corner House* okazis kurso de f-ino Saxl, por gekelnero; ankaŭ tie oni starigis klubon, kaj esperantlingvaj menukarto estis troveblaj en ĉiuj Lyon's-restoracioj de la centra regiono. — 3. *London & North Eastern Railway* (grava fervoja kompanio) eldonis prospekton en Esperanto. — 4. Plej grave: la *Brita Poŝta Administracio* eldonis broŝuron pri poŝta servo, en Esperanto.

Kiu ridas?

Mi aŭdis prononci kun ton' de mokridanto
Malantaŭ mia dorso la vorton « Esperanto ».
Mi turniĝis;
Tuj mutiĝis
Aroganta voĉo de la parolanto.
Okule mezuris mi lin de l' kap' ĝis bazo
Kaj firme mi diris kun forto kaj emfazo:
Ni ja vidas,
Kiu ridas,
Kiam venos taŭga la okazo!

Ni esperantistoj, ni estas
La estroj de l' interkompren';
Sed vi ja nur sklavoj restas
De l' praa Babela malben'.
Dum ke vi sidadas sur seĝoj
Dek jarojn, ŝvitante ĉe l' stud',
Ni estas ridantaj la reĝoj,
Regantaj la lingvon per lud'!

La homon mi poste renkontis eksterlande:
Perdinte vojon ie li staris stratorande,
Senkompase,
Embarase...
La spektaklon jen mi ĝuis frande.
Kun mi tiam estis amik'-samideano,
Komune ni helpis al mia samlandano.
« Nun mi vidas,
Kiu ridas »,

Diris li, kun prem' de mia mano:
« Vi esperantistoj, vi estas
La estroj de l' interkompren';
Sed ni nur la sklavoj restas
De l' praa Babela malben'.
Dum ke ni sidadas sur seĝoj
Dek jarojn, ŝvitante ĉe l' stud',
Vi estas ridantaj la reĝoj,
Regantaj la lingvon per lud'! »

Okazis kongreso en urbo metropola,
Por ĝi zorgitaj estis pro l' lingvomiks' petola
Multaj dratoj,
Aparatoj,
Kaj cent vortjonglistoj por traduk' parola.
Ĉu bona rezulto? Ha, estis ĝi mizera:
Fuŝaĵo, flikaĵo — la klopodado klera.
Ĉu diskutoj?
Ne, balbutoj!
Kaj la celo de l' kunven'? Kimera!

Ni esperantistoj, ni estas
La estroj de l' interkompren';
L' aliaj nur sklavoj restas
De l' praa Babela malben'.
Dum ili sidadas sur seĝoj
Dek jarojn, ŝvitante ĉe l' stud',
Ni estas ridantaj la reĝoj,
Regantaj la lingvon per lud'!

Londonon ni venis el ĉiu land' de l' Tero:
Sur reloj, super ondoj, kaj alte tra l' aero.
En la koro
Bonhumoro,
Ĉar atendis nin la plej ĝojiga sfero.
Neniu blasfemas, neniu jam enuas;
Ne estas plu baroj: facile vortoj fluas.
Ne sinĝeno,
Sed kompreno!

Tiel ni kongreson vere ĝuas!
Ni esperantistoj, ni estas
La estroj de l' interkompren';
L' aliaj nur sklavoj restas
De l' praa Babela malben'.
Dum ili sidadas sur seĝoj
Dek jarojn, ŝvitante ĉe l' stud',
Ni estas ridantaj la reĝoj,
Regantaj la lingvon per lud'!

Kredeble tio estas la unua oficiala uzo de Esperanto fare de la Brita Registaro. — Krome ni faris paŝojn ĉe la gazetaro, kaj de tio ni atendas tiel bonan rezulton, ke f-ino Saxl restos ankoraŭ en Londono por gvidi kvin novajn kursojn sub aŭspicioj de la Edukada Aŭtoritato mem. — Lastmomente ni eksciis ke B.B.C. (Brita Radio-Kompanio) sabatvespere disvastigis paroladeton en Esperanto. Krome ĝi fiksas partojn de la Malferma Kunsido sur diskoj, kiujn disaŭdigos la franca stacio *Paris PTT* hodiaŭ vespere je 22.45.

Kaj, plej interese: Jaŭdon vespere nia prezidanto, generalo Bastien, ricevos rekte el Aŭstralio saluton de aŭstraliaj esperantistoj per telefono.

Pro la kongresa laboro ni tamen ne forgesis la laboron por la Ligo. Ĝis fino de junio 1938 estis 8776 membroj pagintaj sian kotizon al IEL, kontraŭ 8282 fine de junio 1937. (La tutnombro de la membroj fine de 1937 estis: 13487.) Sed tiu pluso de 500 membroj ne sufiĉas por ekvilibri la budĝeton. Ni devas atingi minimume 4000 individuajn membrojn. Certe vi ĉiuj kredas je la venko de Esperanto; ĉu ne vi ĉiuj povus aliĝi al IEL kiel individuaj membroj? Ĉiu, kiu aliĝos kiel individua membro dum la kongreso, ricevos premion.

La Propaganda Oficejo de IEL en Stokholmo dissendis multe da valoraj instigoj al la landaj asocioj. Pri tio vi aŭdos jaŭdon specialan raporton.

Niaj gazetoj, semajna kaj monata, sub la redaktado de s-ro Jung, regule aperas; sed se ni havus pli multe da abonantoj, ni kaj li povus plibonigi ilin kaj eventuale ankaŭ malaltigi la abonprezon.

Fine, s-ro Goldsmith dankas al la prezidanto kaj al la tuta stabo de IEL pro la bona kunlaborado, kaj esprimas la esperon ke ankaŭ la esperantistaro dankos al ili ne nur per aplaŭdo sed per aktiva kunlaborado.

S-ro Bastien dankas al s-ro Goldsmith pro la raporto kaj ĝenerale pro la modela laboro farata de li ĉiutage, kaj kun ĉi tiu danko li kunligas tiun al la geoficistoj de IEL, al la Estraro kaj Komitato, kies membroj estas ne nur profunde esperantistaj sed ankaŭ tre praktikaj homoj.

Li transdonas la parolon al s-ro Oliver, komitatano kaj estrarano, por mallonga sed instiga parolado.

Ĉiam (diras s-ro Oliver), kiam mi rakontas al neesperantista konato, ke Esperanto bone progresas, interne mi tamen pensas ke mi ne estas kontenta, ĉar Esperanto ankoraŭ ne venkis. Estas necesege ke ni plimultigu la nombron de niaj adeptoj. Ankoraŭ validas la vortoj de nia majstro, kiujn li antaŭ preskaŭ kvindek jaroj direktis al iu sinjoro R. en Moskvo: *Mi ripetas, ke ĉiu kiu ne faras*

al si en la fino de ĉiu monato la demandon « ĉiom da novaj amikoj mi alportis al la afero », tiu ne povas sin nomi amiko-laboranto de nia afero, se li eĉ tute bone ellernis la lingvon.

Kiaj estas la nunaj esperantistoj? Ili estas tre diversaj. Sed dank' al tio ni havas kelkajn sindonemajn laborantojn kiuj atingis la sukcesojn por ni. En Varsovio ni aŭdis pri la unuaj pioniroj. Ankaŭ ni estas pioniroj, sed nia tasko jam estas pli facila. Tamen la estonteco de nia afero dependas de nia laboro. Ni povos esti kontentaj nur, se ni konstante antaŭeniros ĝis la venko. Kaj por tio ni bezonas interalie ankaŭ — monon. Ni havas ne nur deficiton sed ankaŭ hipotekon. Ĝin ni volas repagi por eviti la rentumon. (Oratoro insistas ke oni laŭeble jam dum la kongreso aliĝu kiel MA, aŭ eĉ MAH.) Ankaŭ la politikaj cirkonstancoj forrabis de ni pli ol duonmilon da individuaj membroj. Mi ne parolas pri la politiko mem; sed la fakto ekzistas. Ĉu ni ne povos pleni tiun mankon? Ni ja montru ke Esperanto vivas kaj vivos. Ni pruvu ke ni igos la mondon akcepti Esperanton!

Sekvas diskuto, en kiu partoprenas la sinjoroj Jung, Kuntze, Bastien, Krolenbaum, kaj Bakker. Jung certigas ke la intereso por Esperanto inter germanaj esperantistoj restas vigla, ke Heroldo regule iras ankoraŭ al pli ol cent adresoj en Germanujo, kaj li legas kelkajn entuziasmajn frazojn el letero de regnogermana samideano. S-ro Bastien diras ke per praktika elmontro de la utilo de Esperanto pli ol per teoriaj argumentoj oni fine sukcesos konvinki la registarojn nefavorajn. S-ro Krolenbaum rakontas el sia familia vivo; pro tio, ke lia edzino estas el alia nacio, ilia hejma lingvo estas Esperanto, kaj ili konstatas ke Esperanto bonege taŭgas por esprimi ĉion. S-ro Bakker mencias pri sperto, kiun li havis propagandante Esperanton en Nederlando.

Post kelkaj anoncoj de s-roj Goldsmith kaj Wadham pri ekskursoj, la kunsido estas fermita.

Lumbildprelegoj kaj fakkunvenoj.

Post la unua laborkunsido okazis komuna fotografiĝo sur la granda ŝtuparo de la kongresejo. Ĝi bone sukcesis.

La posttagmezo estis rezervita al diversaj prelegoj kaj fakkunvenoj. Bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj okazis en la sama horo, kaj tiel estis neeble viziti ĉiujn aŭ eĉ nur kelkajn el ili. Por 14.30 h. estis anoncitaj: 1. prelego kun lumbildoj, de L. Alseika, pri la temo « Popolo kiu translokiĝas » (Nova Litovujo); 2. kunsido de la Lingva Komitato; 3. kunsido de Skolta Esperantista Ligo; 4. kunsido de Tutmonda Esperantista Kuracista Ligo; 5. Bahai-kunsido. Jam duonhoron

poste komenciĝis la inaŭguro de la 15-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Kaj por 16.00 h. estis indikita lumbildprelego pri Berno, la urbo de la 31-a U. K.

“Eliza Restas”.

Vere, ankaŭ la verbon oni presis per granda komenclitero, kio devas do signifi ke ŝi tutcerte restos. En la Kongreslibro estas indikite ke la hodiaŭa (lunda) prezentado de « Eliza Restas » (en Scala Theatre, Charlotte Street) estas « nur por tiuj kun ruĝaj, ruĝetaj, aŭ blankaj biletoj ». Esplorante la mian, mi konstatastas ke ĝi estas « ruĝeta ». Sekve, mi iros hodiaŭ.

Kaj mi iris.

Kaj ne seniluziĝis. (Nebela vorto, cetero; britaj samideanoj proponis enkonduki novan vorton « desaponti », sed ĝi ŝajnas al mi ne multe pli taŭga, ĉar ĉi-kaze mi devus diri: « mi ne estis desapontita ».)

Kvankam pri teatraĵoj mi havas mian specialan guston — « Eliza Restas » ne estis tre konforma al ĝi —, sed ĝojis mi, ke la elparolado de nia lingvo ĉe la anglaj geaktoroj (kun unu escepto; sed tio ne difektis la impreson, sed ĉi-kaze eĉ akcelis ĝin, ĉar temis pri speciala tipo) do mi diras ke la prononcado estis tute ne « angla » sed modela. Ankaŭ la ludo estis bona kaj « glata » — oni ne rimarkis la sufloron. Fakte, mi sidis iom malantaŭe, kaj pro tio eĉ perdiĝis al mi ne malofte iuj paroloj de l' geaktoroj; sed ŝajnis ke la teatraĵo estis konsciencie enstudita. Laŭdo por la geaktoroj, por la reĝisoro, kaj por la lerta instru-laboro de f-ino Saxl! La publiko ne ŝparis aplaŭdojn, kaj post la fino de la prezentado la « ĉarma » Eliza kaj ŝiaj kunludintoj devis ĉiam denove montri sin al la entuziasmita publiko.

La enhavo de la komedio estas proksimume jena: Al juna sinjoro iu mortinta amiko postlasis sian filineton, Eliza, kiel heredajon. La juna sinjoro antaŭĝojas ke la knabineto portos ridon kaj ĝojon en lian fraŭlan loĝejon. Li dungas artistinon, aĉetas ludilojn, kaj jen aperas la knabineto — jam en edziniĝkapbla aĝo! La cetero restis al mi pli malpli malklara. Sed en la fino — kiel povus esti alie? — la juna sinjoro edziniĝas sian zorgatinon, kaj « Eliza Restas ».

Mardo

Parolas fama oratoro:

D-ro Edmond Privat pri « Esperanto kaj Mondfrateco ».

Estis granda ĝojo, ĉi-matene en la kongresejo renkonti malnovan pioniron, kies forestadon oni kun bedaŭro sentis dum multaj jaroj pasintaj, kaj refoje premi lian manon. *Edmond Privat* mal multe ŝanĝiĝis en tiu tempo. Kaj ankaŭ

lia brila oratoreco, kiel ni poste konstatis, restis la sama. Domaĝe, ke la nova generacio de esperantistoj apenaŭ konas lian nomon, kaj jam ne scias ke Edmond Privat iam estis — kaj ankoraŭ estas — la plej kapabla oratoro de l' internacia lingvo. Tiel okazis, ke la Granda Salono de l' Universitata Kolegio, en kiu li estis parolonta hodiaŭ, estis kvankam tre bone okupita tamen ne tiel plenplena, kiel ni malnovuloj povus atendi, kiam estas Edmond Privat kiu parolos.

Oni povas bedaŭri ke, pro iuj miskomprenoj kaj malpacoj, nia movado kvazaŭ perdis tiun valoran pioniron kiel aktivan kunlaboranton; tamen ni konstatare kun plezuro, ke D-ro Privat plu laboras en medioj, kies ideoj iel intertuŝiĝas kun la ideo de l' Esperantismo, ke li ne hezitas plue publike uzi nian lingvon, kaj ni esperas, ke iam tamen ni denove vidos lin kiel unu el la aktivaj kunlaborantoj de nia afero kaj de nia movado.

(Pro manko de loko, pri ĉi tiu kunveno ni raportos detale en la venonta numero.)

Denove fakkunvenoj, teatraĵoj kaj filmoj.

La marda posttagmezo denove estas dediĉita al diversaj fakkunvenoj, pri kiuj eventuale aperos apartaj raportoj. Okazis, ĉiuj samtempe, je 14.30, la jenaj laŭprogramaj: 1. Kunsido de la IEL-Komitato; 2. Kunsido de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE); 3. kunsido de katolikoj; 4. « Paco kaj la Tero »; 5. « Denaska Esperantistaro »; 6. kunsido de kooperativanoj; kaj, ekster la programo, 7. kunsido de la Blindula Kongreso.

Vespere estas ripetado de la teatra prezentado « nur por tiuj kun bluj, verdaj aŭ flavaj biletoj ». Por la ceteraj oni ripetas alian aranĝon, kiu same jam estis prezentita hieraŭ, nome prezentadon de filmoj, de iluziaĵoj kaj violonludon.

Do, mi vizitas hodiaŭ la Grandan Salalon, kie oni montras kelkajn belajn filmojn pri Svislando (en germana lingvo, sed esperantlingvan klarigon donas s-ro *Otto Walder* el Bern), filmon de s-ro *Ravestein* el Hago pri lia kongresvojaĝo al Aŭstrio, kaj ankaŭ filmon pri la lastjaraj Internaciaj Feriaj Kursoj en Helsinko. La esperantista iluziisto *Vilĉjo Verda* (alinome William Green) prezentas, helpate de sia verda amikino, interesan programon kaj pravas denove la verecon de la proverbo ke « Rapideco ne estas sorĉado ». Estas tamen mirige, de kie li subite elsorĉas tutan bukedon da floroj aŭ — en la fino — kompletan Esperantan standardon. S-ro *Johano Geryk* el Ĉeĥoslovakujo prezentas kelkajn ĝuigajn violonsolojn.

Tro rapide pasis ankaŭ tiu ĉi tago. Oni iras ankoraŭ refreŝigi sin per iu malvarma suĉaĵo, ĉar la varmego estas kovanta super tiu ĉi urbego, — kaj poste akceptas nin la lito, kaj ni ekdormas kviete renkonte al nova kongresa tago.

Merkredo

Tago de la Ekskursoj.

Post laboro — ripozo. La LKK organizis kvar ekskursojn: unu al la Ŝekspirurbo Stratford-on-Avon, Warwick kaj Oxford, duan al Hastings kaj Eastbourne, trian al Windsor kaj Hampton Court, kaj kvaran al la Zoologia Parko en Whipsnade.

La ekskursoj estis « nur por tiuj, kiuj havas biletojn ». T.e. oni devis antaŭe anonci sin por la ekskursoj, jam antaŭ la kongreso. Sendube saĝa decido, por eviti malagrablaĵojn kaj garantii bonan sukceson. Mi ne antaŭanoncis min. Se estus nur unu ekskurso, mi partoprenus. Sed ĉar estas kvar, mi preferis resti en la kongresurbo, matene iom labori — antaŭlabori por la kongresa raporto — kaj posttagmeze uzi la servojn de unu el la esperantistaj taksistoj, kies aŭtomobiloj ĉiam atendis sur la placo antaŭ la kongresejo, kaj fari rondveturon tra la pli bela parto de la urbo.

Tamen mia ideo, resti en Londono, ne sukcesis. Venis al mi en la marda posttagmezo s-ro Oliver demandante, ĉu mi volas partopreni trakampanan veturon en lia aŭtomobilo, en kiu ĝuste unu loko ankoraŭ estas libera. Ĉu rifuzi tiel afable prezentitan proponon? Certe ne!

Do, jen mi, kune kun s-ro Oliver, la mastro de la aŭtomobilo, s-ro Wilkinson, sekretario de BEA, kaj f-ino Pratt, en la freŝa mateno rapidantaj tra la stratoj de Londono, eksteren, al la kamparo.

Pli frue, ol mi atendis, ni estas ekster la domdezereto. Do, eĉ tiu ĉi ŝajne senlima urbego ie havas finon!

Bonege kuras la « Morris »-veturilo de nia invitinto. Kun 40, 50, 60, eĉ 70 homoj (30 anglaj mejloj estas proksimume 50 kilometroj!). Ie ni trafas la aŭtobusojn de la unua ekskurso, jam pli frue ekveturintaj ol ni. Granda sensacio! Salutoj tien-reen, kiam ni preterpasas ilin. Bedaŭrinde ili ne estas sufiĉe ornamitaj per Esperanto-flagoj, — estus bona okazo por propagando. Ĉe la antaŭa vitro de nia « Morris » flirtas almenaŭ flageto.

Kaj poste ni rapidegas tra la kamparo: al Bicester, Banbury — kie ni gustumas la tieajn famajn kuketojn, plue al Warwick kun ĝia fama kastelo, kaj fine preskaŭ ĝis Birmingham. T.e. la celo de la veturo estis renkonti en antaŭurbo de Birmingham amikon de nia afero, konstruestron kiu afable montras al ni sian interesan parkon kaj kiu donas prome-

son finance subteni nian movadon per konsiderinda sumo. Poste ni daŭrigas la veturon al Stratford, kie ni refoje renkontas la partoprenantojn de la unua ekskurso, veturas tien-reen tra la stratoj por pasi la domon de Ŝekspiro, kaj poste daŭrigas al Oxford. Estas interese, revidi la urbon de la 22-a Universala Kongreso. De tie returne al Londono.

Vespere oni amuziĝas per babilado kaj dancado en la ejo de Londona Laborista Esperanto-Klubo, kiu estis invitinta tien por « Amikeca Vespere ». Tre multaj kongresanoj sekvis la afablan inviton kaj ĝuis la vesperon.

Ĵaŭdo

Margarete Saxl †.

La temo de la Dua Laborkunsido: Kiel plimultiĝi la esperantistojn.

10.10 h. La kongresanoj kolektitaj en la Granda Salono por la dua laborkunsido.

Generalo *Bastien*: Mi devas fari al vi teruran sciigon: Fraŭlino Saxl ĵus mortis. La kunsido estas fermita. Ni rekomencos la kunsidon post unu horo.

★

Lapidare, martelbate efikas la vortoj de l' prezidanto. Konsterno, silento. Oni rigardas unu la alian, demande, mute.

Fraŭlino Saxl ne plu estas! Ĉu eble? Ŝi, kiu multege kontribuis por la sukceso de tiu ĉi kongreso, — ŝi, al kiu oni dankas la kursojn ĉe Selfridge, ĉe Lyon's kaj la esperantistajn geaktorajn, — ŝi, kiu estis la plej lerta, la plej sukcesplena instruistino de Esperanto, fraŭlino Saxl ne estas plu!

Kiel okazis tio? Ĉu akcidento? Ĉu la koro? Ĉi estis la koro, certe! Antaŭ du tagoj mi demandis pri ŝia farto. « Ho, mi estas feliĉa! » respondis ŝi. « Ĉio tiel bone sukcesis, kaj mi havas laborpermeson por la aŭtuno. » « Sed », ŝi aldonis, « ĉi tie » — metante la manon sur sian koron — « tio kelkfoje forlasas min... Sed sen tio, mi estas feliĉa. »

Samideano rakontas ke ĉe la matenmanĝa tablo ŝi deglitis, tute subite, senkonscia, kaj restis tia ĝis la forpaso. —

11 h. La laborkunsido rekomenciĝas.

Oni estas kolektinta kelkajn datojn kaj faktojn pri la vivo de f-ino Saxl. Generalo *Bastien* dediĉas al ŝi nekrologon, rakontas pri ŝi tiom kiom oni sukcesis eksci ĝis tiu ĉi momento. Sed ĝis nun (aldonas la prezidanto) ni scias nemulte pri ŝia familio. Unu familio certe funebras ŝin: la esperantista. Ĝi neniam forgesos ŝin.

Poste la prezidanto komunikas la rezulton de la elektoj por la IEL-Komitato. Ĝi konsistas nun el la jenaj komitatanoj: Baas, Bastien, Blaise, Bugge-Paulsen, Bujwid, Canuto, Couteaux,

Dahl, Dalmau, Domingues, Dubois, Hansen, Grolleman, Hetzel, Jansson, Heikenwalder, Kempeneers, Lapenna, Long, Malmgren, Minkov, Oliver, Petit, Rollet de l'Isle, Scholze kaj Sindo-Seitaro. La *Estraro* konsistas el : prez. generalo Bastien ; vicprez. Malmgren ; membroj : Kempeneers, Lapenna kaj Oliver.

Ekparolas s-ro *Malmgren* pri la temo « Propagando ». Ĝenerale ŝajnas (li diras) ke la Landaj Asocioj estas kon-

adon : En mia raporto mankas multaj landoj ; eble ili ne bezonas la konsilojn, sed eble kelkaj ne estas sufiĉe organizitaj, precipe tial, ĉar ili ne havas *propran oficejon*. Rakontas, kiel ili en Stokholmo fondis tian, per la entuziasmo de 16 junuloj. Oni povas alligi Librofakon kaj eventuale Turisman Servon. Ni devas ankaŭ zorgi ke ni havu *salajratajn oficistojn*, por ke ili dediĉu sian t u t a n forton al la poresperanta laboro, simile kiel estas ĉe aliaj idealistaj movadoj.

Tiu sistemo ŝajnas tre, eĉ tro simpla, vi eble opinias. Ni supozu ke en lando 1000 samideanoj fariĝas varbgaranti-antoj. Post unu jaro estos 2000, post du jaroj 4000, poste 8000 ktp. Se ĉiu en ĉiu jaro varbos *nur unu novan* !

Certe, oni ne povas atendi ke ĉiu 100 %-e plenumos sian promeson ; tamen ni facile povos kreski ĝenerale, se ni solidare laboros. Ĝis nun okazis ke en unu lando ni kreskas bone, en alia malbone ; laŭ la nova ideo ni kresku *egalmezure* en ĉiu lando, *ĉie konstante*. Hejmen veninte, ni eklaboru kaj daŭrigu « ĝis la fina venko » !

S-ro *Bastien* : Ofte oni renkontas personojn, kiuj iam lernis Esperanton sed ne estas retenitaj. Tio estas nia tasko : reteni la homojn ! Certe nia nombro devas kreski sufiĉe rapide en la diversaj landoj. Mi supozas ke precipe ĉiu kongresano estas fervora esperantisto. Do, *amase subskribu la promeson* jam dum tiu ĉi kongreso !

S-ro *Pragano* substrekas la gravecon de tiu ideo. Nia ĉefa afero estas akiri la amasojn. Iam Zamenhof havis similan ideon de « Vastigantoj ». Tamen, kvankam komence estas facile trovi po unu novan esperantiston, sed kun ĉiu plua jaro tio estos pli malfacila. La komitato klopodu akiri taŭgajn rimedojn por reteni la klubanojn kaj por esperantigi la esperantistojn. La ĉefa problemo ne estas la nombro, sed la *kvalito*.

D-ro *Lapenna* : Nepre gravas la kvalito. Sed ekzistas homoj jam denaske bonkvalitaj. Do, ju pli granda la *nombro* de esperantistoj, des pli granda ankaŭ la *nombro de kvalituloj* inter ili. Kio koncernas proponojn por reteni la komencintojn, la gusto ĉie estas malsama. Kio en iu loko estas treege taŭga, tio en alia loko absolute fiaskas. Precipe ni atentu la *lingvan* kvaliton, do en la kluboj oni nepre parolu Esperanton.

S-ro *Marc Darnault* petas ke la Esperanto-verkistoj traduku taŭgajn teatraĵojn kaj sendu ilin al Parizo por disaŭdigo per radio.

Gen. *Bastien* fermas la kunsidon je 12.30, kaj petas ke oni nun tuj venu por subskribi la promeson esti varbgaranti-anto. (Multaj ĉeestantoj alvenas por subskribi.)

Pliaj fakkunvenoj kaj vizitoj.

Jaŭdon posttagmeze okazis la jenaj fakkunvenoj : Kunsido de IEL-Komitato ; dua kunsido de TAGE ; kunsido de Internacia Scienca Asocio Esperantista ; kunsido por komercistoj ; kaj kunsido de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Framasonoj vizitis la novan ĉefsidejon de Londonaj framasonoj.

Krome, kiel ĉiutage, okazis rondveturoj tra la urbo, kaj diversaj vizitoj.



Tiu ĉi foto, kiu montras f-inon Saxl brillumora en rondo de diverslandaj gesamideanoj, estas prenita unu tagon antaŭ ŝia morto. (Fotografis: Alvarez.)

tentaj, ke ili ricevas de la Propaganda Oficejo de IEL proponojn por la propagando. Ĉiu landa asocio tiel vidas, ke IEL vivas, kaj tio per si mem jam estas instigo.

Poste oratoro pritraktas unu post alia la diversajn punktojn de propagando : turismaj servoj, instruistaj kursoj, internacia interŝanĝo de mallongaj teatraĵoj por vigligi la grupvesperojn, materialo por ekspozicioj, pasiva membreco, propagandaj monfondo, monkolektoj laŭ certa sistemo, raportado, hotelservo, koresponda kurso de IEL, Esperanto-semajnoj, turistikprelegoj, gazetara informservo. Li interrompas sian paroladon por ebligi mallongan diskuton.

S-ro *Arnfinn Jensson* diras ke precipe la gazetservo estas grava. La homoj kelkfoje pli atentigas informojn en gazeto, ol se iu persone atentigas ilin. En Norvegujo oni havis tiurilate bonegan sukceson. En 1935 aperis ĉ. 900, en 1936 jam 1400, kaj en 1937 eĉ 2000 artikoloj aŭ notoj pri Esperanto en la norvega gazetaro.

S-ro *Midas* mallonge raportas pri sia agmaniero ĉe Internacia Amikeca Ligo ; inverse kiel oni kutime faras, li tie unue oficialigis Esperanton kaj poste esperantistigis la membrojn.

S-ro *Bastien* legas komunikon pri instruado de Esperanto en Katalunujo.

S-ro *Malmgren* daŭrigas sian parol-

Post interrompo per saluto de *hungara ŝkolto*, kaj kanto de unu strofo de « La Espero » (por plivigliĝo ! ?), *Malmgren* demandas : Esperantistoj, kion ni atingis dum kvindek jaroj ? Ni atingis unu miraklon : ke oni interkompreniĝas per Esperanto ! Sed alian miraklon ni ne atingis : ke la mondo tuj akceptis Esperanton. Sed mi ne kredas, ke la registaroj faros leĝon pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn, antaŭ ol ni ne estos forto kaj povos *postuli* tian leĝon. Ofte oni diras : unu kursano estas nenio, nulo, ne valoras la penon ; sed *multaj nuloj kun unu cifero 1 antaŭe estas miliono* ! Ĉiu povus facile fari unu novan esperantiston ; sed vi ne faras, ĉar vi ne scias ke ĉiu alia faros same. Pro tio estas grave ke ni ĉiuj faru *promeson* ke ĉiu el ni faros unu novan esperantiston. Eĉ ne nur kursanon, sed veran *esperantiston* ! Se oni insistos, oni certe sukcesos. Oni *ne plu lasu* la homojn, kiuj jam iom scias Esperanton, kiuj komencis lerni la lingvon. Pro tio estas plej bone, elekti *unu* kaj kvazaŭ akompani lin, ĝis kiam li estos esperantisto. Kaj por ke oni fakte faru tion, estas grave fari *promeson*. Tiun akiradon de unu nova esperantisto oni devas konsideri *honora devo*. Tial ni presigis specialajn *promesilojn*, kiujn vi, kiujn ĉiu esperantisto bonvolu subskribi, kiel *varbgaranti-anto*.

La Kongresa Balo.

La Kongresa Balo kutime estas la apogeo de la kongreso, almenaŭ por la pli juna generacio kaj por tiuj kiuj dum ĉi tiu okazo ŝatas elmontri siajn belajn nacianjn kostumojn.

Jen do la gekongresanoj kolektiĝintaj en la granda « Tudor Ballroom, Alexandra Palace » en la norda parto de Londono, kien oni alveturis per specialaj vagonaroj. Eĉ la biletkontrolisto ĉe la kajo lernis almenaŭ unu Esperantan vorton: « Dekstren! », ĉar je tiu flanko staris la speciala vagonaro.

La balejo aspektas ne tre palace de ekstere, sed interne ĝi estas tre bela, la dancplanko grandega kaj bonega, ankaŭ la orkestro estas tre bona. Sed ĝi tro malatentas la internacian konsiston de la publiko, ludante tro ofte dancojn kiujn nur britoj kapablas danci, kaj ĝuste tiuj dancoj daŭras tre longe, preskaŭ senfine. Tamen estas ankaŭ valsoj, fokstrotoj kaj tangoj, kaj do ĉiu, kiu entute emas danci en tiu ĉi nokto, foje trovas iun dancon taŭgan por li. Ne mankas ja la ĉarmulinoj, sinjorinoj kaj fraŭlinoj, kaj entute en la Londona kongreso la ina sekso estas bonproportie reprezentita.

Kiel kutime, la plej pentrindan vidajon dum la balo prezentis la naciaj kostumoj. Ĉu oni, kiel estis projektite, televidigis ilin, mi ne eksciis. Apenaŭ alveninte en la balejo, mi devis ree forlasi ĝin por afero eĉ pli interesa: nome, por ĉeesti telefonan interparolon en Esperanto inter Londono kaj Aŭstralio. Kaj, reveninte poste, mi jam forgesis pri la televido.

Esperanta interparolo telefona kun Aŭstralio.

Estis ne tute simple, trovi en la malfrua vespero la enirejon al ĉi tiu granda Telefona Centrejo. Ni veturis tra kelkaj mallarĝegaj stratoj, esplorigardis kelkajn altegajn domojn, vane frapis kontraŭ ŝlositaj pordoj, sed fine tamen, kvankam kun ioma malfruiĝo, alvenis al la ĝusta loko.

Kaj nun ni sidas, kelkaj elektitaj gesamideanoj, kun kapaŭdiloj sur la oreloj, atendante tion kio estas okazonta: post kelkaj minutoj nia ŝatata prezidanto, intendanto-generalo *Louis Bastien*, kiun ni akompanis ĉi tien, estas parolonta kun samideano en Aŭstralio.

Ha, voĉoj! Anglalingve ni aŭdas: *One-two-three-four-five — here is London calling Sydney and Melbourne!* (Unu-du-tri-kvar-kvin — ĉi tie estas Londono vokanta Sydney kaj Melbourne!)

Kaj plue: *Hallo Melbourne! This is London calling you... We are ready to commence the speech of general Bastien.* (Hallo M.! Ĉi tio estas Londono vokanta vin. Ni estas pretaj komenci la

konversacion de generalo Bastien.)

Jes, ni estas pretaj, kaj la generala moŝto estas atendanta. Sed de transe venas nur nekompreneblaj vortoj, kaj iuj strangaj bruoj, kvazaŭ sonorilaj sonoj aŭ, pli vere, kvazaŭ ŝtalo sin frotus je ŝtalo. Re- kaj refoje oni provas: *Hallo Melbourne! This is London calling Melbourne*, ktp.

Fine, post 12-minuta atendado, la kontakto funkcias. Oni aŭdas, kiel ĉe la alia fino, trans kontinentoj kaj oceanoj, fakte sur la alia flanko de la terglobo, sube de niaj piedoj, iu radio-anoncisto donas anglalingvan klarigon pri la okazonta konversacio.

Subite la unuaj vortoj esperantlingvaj trafas niajn orelojn. Oni demandas la generalon, ĉu li povas aŭdi. Li respondas jese. Kaj tiam la voĉo ĉe la alia fino, klare aŭdebla kaj bone komprenebla, diras saluton al la estimata prezid-

anto de IEL, al la kongresanoj kaj al ĉiuj esperantistoj, kaj deziras ĝojigan kaj sukcesplenan kongresadon. « Fariĝu la Esperantomovado pli kaj pli vasta, por ke la verko de nia majstro baldaŭ triumfu ĉie en la mondo por la beno de la homaro! » Oni salutas ankaŭ la aŭstraliajn delegitojn en la kongreso. « Mi tre envias vin; sed kvankam mi ne povas korpe ĉeesti, tamen ankaŭ mi ĉeestas spirite kaj voĉe. »

S-ro *Bastien* tuj respondas: La 30-a Universala Kongreso de Esperanto ne forgesas la samideanojn, la amikojn kiuj pro la granda distanco ne povis veni kaj interpreti manojn kun ni en tiu ĉi kongreso, kiu okazas en atmosfero de vera amikeco. En tiu ĉi momento, en la nomo de ĉiuj kongresanoj mi tutkore salutas la aŭstraliajn samideanojn, speciale tiujn kiuj organizis tiun ĉi konversacion kaj nun estas aŭskultantaj.

Lasta listo de kongresanoj

1510. F-ino T.S. De Zoete, Hillegersberg, Ned.
 1511. E. Carlén, Yxhult, Svedujo.
 1512. F-ino J. Richardson, Kilbirnie, Skotlando
 1513. F. Cornell, Newcastle-on-Tyne, Anglujo
 1514. R. A. Angeli, Vincennes, Francujo.
 1515. E. L. Scott, Shepscombe, Anglujo.
 1516. G. Aström, Gefle, Svedujo.
 1517. P. Blaise, Morden, Anglujo.
 1518. C. Domingues, Rio-de-Janeiro, Brazilo.
 1519. Prof. St. Minkov, Sofia, Bulgarujo.
 1520. T. Kasin, Oklungen St., Norvegujo.
 1521. J. Bronne, Sherringham, Anglujo.
 1522. F-ino A. Eckard, London, Anglujo.
 1523. F-ino B. Dvarionovics, Kaunas, Litovujo.
 1524. E. W. McCanlis, London, Anglujo.
 1525. H. Hyams, London, Anglujo.
 1526. F-ino I. Van Hoe, Nieuwpoort, Belgujo.
 1527. F-ino E. Van Hoe, Nieuwpoort, Belgujo.
 1528. S-ino C.E. Burley, Huddersfield, Anglujo
 1529. G. F. L. Spurdens, Fixby, Anglujo.
 1530. F-ino M. Charnley, Haslingden, Angl.
 1531. C. Andrew, Hyde, Anglujo.
 1532. F-ino D. Heywood, Manchester, Angl.
 1533. F-ino M. Murphy, Manchester, Anglujo.
 1534. S-ino M. E. Rickson, Hyde, Anglujo.
 1535. J. Wooley, Leigh, Anglujo.
 1536. R. K. Hurgon, London, Anglujo.
 1537. A. Thyssen, Nysur, Danlando.
 1538. S-ino E. Le Balch, Paris, Francujo.
 1539. P. Nugon, Versailles, Francujo.
 1540. S-ino L. Nugon, Versailles, Francujo.
 1541. D-ro V. Jovanovic, Karlovac, Jugoslav.
 1542. F-ino N. Kok, Rotterdam, Nederlando.
 1543. E. Andersson, Malmö, Svedujo.
 1544. F-ino E. O. Robertson, London, Anglujo.
 1545. L. Ó hUiginn, Baile Átha Cliath, Irlando.
 1546. H. Jackson, Bucuresti, Rumanujo.
 1547. F-ino D. M. Roberts, London, Anglujo.
 1548. R. J. Klok, Peizermade, Nederlando.
 1549. F-ino C. Bruér, Malmö, Svedujo.
 1550. F-ino M. Madden, London, Anglujo.
 1551. H. Jordan, London, Anglujo.
 1552. F-ino M. Poláková, Hradec Králové, Ĉeĥ.
 1553. J.W.M. Stevens, Rotterdam, Nederlando.
 1554. C. J. Terra, Amstelveen, Nederlando.
 1555. F-ino D. M. Wiseman, London, Anglujo.
 1556. S. Ó hEideáin, Baile Átha Cliath, Irlando.
 1557. F-ino T.E.D. Kastrop, Korsor, Danlando.
 1558. A. Bernardt, Alvesta, Svedlando.
 1559. D-ro R. Pallejá, Rosario, Argentino.
 1560. S-ino A. Cízková, Slavkov u Brna, Ĉeĥ.
 1561. J. L. H. Moll, Leiden, Nederlando.
 1562. S-ro Baroch, Praha, Ĉeĥoslovakujo.
 1563. W. Pearce, Portsmouth, Anglujo.
 1564. Pastro W.J. Carter, Birkenhead, Anglujo.
 1565. F-ino M. Miks, Praha, Ĉeĥoslovakujo.
 1566. F-ino L. Hawley, Ilkeston, Anglujo.
 1567. F-ino H. Mayne, Bristol, Anglujo.
 1568. W. H. C. Lewis, Bristol, Anglujo.
 1569. F-ino A. Huetting, London, Anglujo.
 1570. S-ino L.G. Tyler, Bournemouth, Anglujo.
 1571. Rezervita.
 1572. S-ro Dusausoy, Paris, Francujo.
 1573. F-ino J. A. Bakker, Apeldoorn, Nederl.
 1574. Prof. M. Fréchet, Paris, Francujo.
 1575. S. Cohen, London, Anglujo.
 1576. J. Kastelein, London, Anglujo.
 1577. S-ino Kastelein, London, Anglujo.
 1579. Wm. Young, Darlington, Anglujo.
 1580. F-ino N. McGovern, Birkenhead, Angl.
 1581. G. Van Cramp, Antwerpen, Belgujo.
 1582. S-ino J. D. Goring, London, Anglujo.
 1583. C. R. Buxton, London, Anglujo.
 1584. S-ino E. Cory, London, Anglujo.
 1585. D-ro St. Bjoudjeff, Sofia, Bulgarujo.
 1586. F-ino M. Fabris, Trento, Italujo.
 1587. S. Borgman, Uppsala, Svedlando.
 1588. S-ino E. S. Simpson, Southport, Anglujo.
 1589. H. Bakker, Amsterdam, Nederlando.
 1590. A. Hartman, Warszawa, Pollando.
 1591. E. Stratev, Sofia, Bulgarujo.
 1592. T. Aihger, London, Anglujo.
 1593. F. Welton, Coventry, Anglujo.
 1594. F-ino I. Leopold, Amersfoort, Nederl.
 1595. D-ro Weiner, Hradec Králové, Ĉeĥosl.
 1596. G. Bell, Doncaster, Anglujo.
 1597. F-ino F. Barker, Hove, Anglujo.
 1598. F-ino I. F. Shipman, Birkenhead, Angl.
 1599. D. Dalmau, Barcelona, Katalunujo.
 1600. F. Eymard, Grenoble, Francujo.
 1601. M. Stričhovič, Budapest, Hungarujo.
 1602. F.F. Jamieson, Glasgow, Skotlando.

Laŭlanda Statistiko de la Aliĝintoj:

Anglujo, 910; Argentino, 1; Aŭstralio, 3; Aŭstrujo, 3; Belgujo, 50; Brazilo, 4; Bulgarujo, 3; Ĉeĥoslovakujo, 30; Danujo, 12; Egiptujo, 3; Finnlando, 6; Francujo, 118; Germanujo, 11; Hispanujo, 3; Hungarujo, 4; Irlando, 8; Italujo, 23; Jugoslavujo, 3; Kanado, 4; Kimrujo, 10; Litovujo, 5; Nederlando, 101; Norvegujo, 31; Palestino, 1; Polujo, 31; Rumanujo, 2; Skotlando, 73; Svedujo, 120; Svislando, 9; Usono, 20.

Entute 1602 el 30 landoj.

La voĉo el Aŭstralio : Mi tre dankas kaj tre ĝojas pri la bonkoreco de via saluto el la kongreso.

Dankinte al la estroj de la radio-ĉefstacioj aŭstraliaj, kiuj disaŭdigas tiun ĉi konversacion, kiuj promesis al la aŭstraliaj samideanoj Esperanto-horeton ĉiunonate, kaj kiuj donacos la diskon, sur kiu estas gravurata la konversacio, al la esperantistaro kiel memoraĵon, *la voĉo el Aŭstralio* deziras ĝuindan dancadon kaj agrablan vesperon. « Nun estas mateno en Aŭstralio, kaj ni nun devas iri por matenmanĝi. Ĝis revido ! ».

S-ro *Bastien* : Ĝis revido, kara samideano !

De transe oni aŭdas ankoraŭ finparolon en angla lingvo, — kaj la unua esperantlingva konversacio inter Eŭropo kaj Aŭstralio estas finita.

Vendredo

Tria Laborkunsido :

Kunlaboro kun Landaj kaj Fakaj Asocioj. — Esperanto en Lernejoj. — Parolado de D-ro Ivo Lapenna.

Je 10.15 la prezidanto, gen. *Bastien*, malfermas la kunsidon, raportas pri la hieraŭa konversacio kun Aŭstralio, kaj faras du anoncojn rilate al la enterigo de f-ino Saxl. Li mencias la programon de la nuna laborkunsido kaj transdonas la parolon al D-ro *Kempeneers*, kiu diras proksimume la jenon :

La Esperanto-movado povas havi praktikan valoron nur, se ĉiuj partoj kunlaboras por la sama celo, se ĉiuj konscias ke ĉiu el ili estas nur parto de la tuto, kaj se ĉiu povas kalkuli pri la kunlaborado de la ceteraj.

Plej grava estas la kunlaborado de la landaj asocioj ; estas necese ke neniu oficiala paŝo estu farata sen la landaj asocioj. Facile estas fari rezolucion kaj prezenti ĝin al oficiala instanco ; sed se oni ricevas malfavoran respondon, tio estus malutila por la estonteco. Tial plej bone oni unue buŝe traktu kun oficialuloj kaj nur, se oni supozeble ricevos favoran respondon, ankaŭ skribe. Estas preferinde, ne fari paŝon ol fari paŝon kiu ne sukcesos.

Kio koncernas la fakajn asociojn, en kiuj estas organizitaj samfakuloj internacie, ili havas forton nur, se iliaj membroj estas organizitaj ankaŭ en sia nacia (neesperantista) faka asocio, kie ili povas plej efike propagandi. Estos utile, ke la landaj asocioj faru kartotekon de siaj membroj kun indiko de ilia profesio, por ke la samprofesiuoj povu agadi komune. Unu esperantisto ne multe povas fari, sed se estas dek, estas jam armeeto. La internaciaj fakakongresoj estas bona ekzemplo pri la lingvokaoso. Antaŭ nelonge mi partoprenis kongreson, kie ĉiuj presaj estis eldonitaj en kvar lingvoj. Oni tradukis la paroladojn per la fama « tradukmaŝino » (aranĝo de

telefonoj kun ebleco aŭdi iun el tri lingvoj, krom tiu de la oratoro). Tiu sistemo havas la mankon ke la tradukistoj ne ĉiam kapablas sekvi la oratoron ; krome nur kvar lingvoj estas reprezentitaj, kio estas tute nejusta aranĝo. Pro tio, agado en internaciaj kongresoj estas tre necesa, sed ĝi devas esti bone preparita. Kaj ĝenerale, *se oni ion komencas, oni devas ĝin daŭrigi ĝis la sukceso.*

Oratoro citas ankoraŭ aliajn eblecojn de kunlaborado kun fak-asocioj (ekz. teknika helpo al la fak-asocioj, publikigo de listoj de fak-delegitoj). La fakaj asocioj faros servojn por la internacia movado, kaj la internacia movado faros servojn al la fakaj asocioj. Alia punkto estas la *financa* demando ; oni povus eble aranĝi specon de « Kliringo », t.e. IEL povus helpi ĉe la enkasigado de la kotizoj por la fakaj asocioj ; reciproke la fakaj asocioj povus helpi al la internacia organizo, ĉar ĉiu membro plifortigas la tutan korpon.

Oni ne forgesu ke *forta internacia organizo estas la nura utilepruvo de nia movado* ; ĉar izolita grupo estas preskaŭ senutila, kaj ĝiaj membroj ne povas esti konvinkitaj esperantistoj. Pro tio mi pensas ke ni devas daŭrigi la komencitan vojon, por la granda profito de nia tuta movado.

Gen. *Bastien* dankas al la oratoro, aldonante : Unu fojon plie tiu raporto montras ke nur per la landaj asocioj kunordigitaj en internacia organizo oni povas fari propagandon praktikan kaj sisteman.

S-ro *Jensson* : Norvega Ligo aranĝis jam antaŭ du jaroj tian sliparon kiam menciis D-ro *Kempeneers*, kaj tiu sliparo estas bazo por nia kunlaborado. Jus ni decidis aranĝi faksekciojn, unue instruistan, kaj poste ankaŭ aliajn.

S-ro *Gérard*, franca skolto, diras ke estas tre interese kunlabori kun aliaj fak-asocioj eĉ neesperantistaj. Li konsilas aranĝi Esperanto-kongresojn samtempe kaj samloke, kiam kaj kie okazas fakaj kongresoj neesperantistaj.

S-ro *Bastien* : Fiksante la lokon de niaj universalaj kongresoj, ni devas konsideri multajn cirkonstancojn. La tradician daton ni ne povas ŝanĝi. Se eble, ni faros niajn kongresojn kune kun alia kongreso, sed ne ĉiam tio estos ebla.

S-ro *Malmgren* substrekas la gravecon ke ĉiu esperantisto subtenu fak-asociojn, eĉ neesperantistajn, por provi esperantigi ilin. Ankaŭ estas bone, ke esperantistoj aliĝu al neesperantistaj fakakongresoj por agi tie.

D-ro *Djoudjeff* opinias ke estus pli efike, se ni dum niaj universalaj kongresoj samtempe organizus internaciajn kongresojn de neesperantistaj fakaj organizaĵoj. Dum niaj kongresoj ni havas la plezuron vidi unu la alian ; sed tio ne

efikas sur la grandan publikon. Se, ekzemple en Bern, ni povus kunvoki feston de popola kulturo, ni miksiĝus kun granda nombro da neesperantistoj, kaj nia propagando estus multe pli efika.

S-ro *Baaten* diras ke ni ne povas ŝanĝi la rolojn. Ni esperantistoj faru propagandon por nia ideo inter fakuloj. Rilate la kongresdaton : ĝi estas fiksita je la plej taŭga tempo ; la fakaj kongresoj akordiĝu al la universala.

S-ro *Krolenbaum* pledas por enkonduko de Esperanto en la preĝejojn ; li rakontas sperton kiun li foje havis en Polujo : dum preĝo kun usonanoj poloj ne diris « Amen », ĉar ili diris ke ili ne komprenis la preĝon de la usonanoj. Kia beno estus, se kristanoj en la tuta mondo komprenus unu la alian !

D-ro *Lapenna* subtenas la proponojn de D-ro *Kempeneers*. En Jugoslavio oni bone kunlaboras kun la laboristaj esperantistoj kaj ankaŭ kun neesperantistaj fakaj societoj. Foje Esperanto estas jam pli vaste konata ol ni esperantistoj supozas. Ni skribis germanlingve al iu bulgara asocio, ne sciante, ĉu ĝi komprenas Esperanton ; tamen ni ricevis respondon en Esperanto.

D-ro *Kempeneers*, responde al D-ro *Djoudjeff*, diras ke ni ne povas nin enmiksi en konkurantajn kongresojn de la koncernaj societoj mem. Sed ni mem jam aranĝis internaciajn konferencojn en diversaj urboj ; kelkfoje ni trovis pro tio eĉ malŝaton ĉe la koncernaj fakaj organizaĵoj. Do, ni devas agi prudente.

S-ro *Malmgren* opinias ke estas bona vojo, dum niaj kongresoj kontaktiĝi kun reprezentantoj de neesperantistaj fakorganizoj, sed estas malfacile aliri tiajn reprezentantojn. Certe estus utile, se neesperantistoj vizitus niajn laborkunvenojn kaj vidus, kiel facile ni uzas nian lingvon.

S-ro *Goldsmith* diras ke oni invitis sed neniu reprezentanto venis, kvankam kelkaj respondis akcepte.

Malmgren : Sekve, oni devas buŝe inviti.

Gen. *Bastien* : Eĉ estus bone, se ni povus mem citi al la registaro ktp. reprezentanton. — Sed nun ni transiru al la temo « Esperanton en la lernejoj » kaj aŭdu la raporton de s-ro *Hartman*.

S-ro *Hartman* skizas unue la ideon de la Interŝtata Esperanto-Akordo. Same kiel analfabetismo estas venkita per deviga vizito al lernejo, same Esperanto ne venkos, se ne la ŝtatoj oficiale ĝin enkondukos en la lernejojn. Sed ĉar verŝajne neniu ŝtato sola komencus tion fari, oni klopodas akiri la subskribon de ses ŝtatoj, kiuj sin devigus enkonduki Esperanton nur tiam, kiam entute ses ŝtatoj estos subskribintaj la akordon. Tiu afero estis komencita jam antaŭ pli ol dek jaroj, kaj siatempe jam estis subskribintaj tri ŝtatoj : Hungarujo, Finn-

lando kaj Aŭstrio. (Pri la IEAk-laboro « Heroldo de Esperanto » amplekse raportis en diversaj numeroj de la nuna jaro, kaj oni bonvolu relegi tie.)

Oni do denove sin turnis al la registaroj en la mondo, kaj ankaŭ ricevis jam multajn respondojn, inter kiuj tri rifuzajn (Belgujo, Hungarujo, Polujo), kvankam ili ne estas kontraŭ Esperanto. Kelkaj respondoj estas tre interesaj. Ni skribis ĉien en franca lingvo, sed ni ricevis respondojn en lingvoj angla, franca kaj germana, kaj la *Registaro de Manĉukĥo respondis eĉ en Esperanto!*

Por influi la registarojn, necesas mobilizi en ĉiuj landoj favoran opinion pri Esperanto. Devas esti unu centro por gvidi tiun aferon, kaj porlernejaj komitatoj en ĉiu lando (se eble, fonditaj de la respektivaj landaj asocioj), konsistantaj el diverstendencaj esperantistoj kaj ankaŭ el neesperantistaj simpatiantoj.

Nia laboro (t.e. de la Varsovia Plenuma Komitato) finiĝis. Vi nun daŭrigu ĝin — ĝis la fina venko de nia ideo!

Bastien: Ni devas tre danki al s-ro Hartman kaj liaj kunlaborintoj, kvankam la rezulto ne korespondas al la faritaj klopodoj. Mi persone opinias ke en tiu ĉi afero la ĉefan laboron devos fari la landaj asocioj, kaj ke la internacia centro nur funkcii kiel peradejo.

S-ro *Goldsmith* legas interkonsente kun la Plenuma Komitato proponatan rezolucion:

Rezolucio pri Internacia Esperanto-Akordo.


(Esperanto en la Lernejojn.)

Aŭdinte la raporton de la Realiga Komitato de la Jubilea Kongreso pri la ĝis nun atingitaj rezultoj de ĝia agado kaj la planitaj laboroj, la 30-a Universala Kongreso de Esperanto dankas la Realigan Komitaton pro la granda laboro ĝis nun farita de ĝi kaj akceptas la sekvantan deziresprimon, kaj transdonas ĝin al la Komitato de IEL:

1. La Komitato de IEL transprenas la aferon el la manoj de la Realiga Komitato kaj gvidos pluan agadon internacian, starigante tiucele specialan fakon « Esperanto en la Lernejojn ».
2. Konsiderante, ke la vojo elektita de la Realiga Komitato estas bona en ĝeneralaj trajtoj, la Kongreso esprimas deziron, ke ĉie, kie ekzistas landaj asocioj, aliĝintaj al IEL, kreiĝu specialaj komitatoj, kiuj pristudos la demandojn kaj agos laŭ lokaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj.
3. Ĉie, kie la kondiĉoj permesos al komitatoj, povas esti altirataj reprezentantoj de ĉiuj esperantistaj aŭ neesperantistaj organizaĵoj, agentaj en koncerna lando, ĉu aliĝintaj al IEL, ĉu ne, neŭtralaj kaj ne-neŭtralaj.
4. La atingitaj rezultoj kaj spertoj devas esti konigitaj al la fako « Esperanto en la Lernejojn » en la Centra Oficejo de IEL.

Komencante diskuton pri tiu ĉi temo, s-ro *Dahl* opinias ke unue ni devas zorgi por la necesaj instruistoj kaj, ĉar eble jamaj instruistoj ne tro emas lerni novan lingvon, ni direktu niajn klopodojn precipe al la seminarianoj.

Gen. *Bastien* pensas ke ni povas uzi ĉi tiun vojon kaj ne lasi la alian. Se pluraj



Esperanto uzita de Manĉu-Registaro kiel diplomatia lingvo

responde al franclingva letero de l' Plenuma Komitato de la 29-a Univ. Esperanto-Kongreso. (Vidu la ĉi-apudan kongresraporton!)

registaroj sin montros favoraj al Esperanto, ni povos puŝi la propagandon precipe en instruistajn rondojn. Supozeble estos pli facile, influi la instruistojn per la registaroj, ol influi la registarojn per la instruistoj.

S-ro *Grolleman*: Se la registaroj aŭskultus nur la instruistojn, Nederlando jam estus enkondukinta Esperanton, ĉar el kvar instruistaj asocioj nederlandaj tri estas favoraj al Esperanto. Nia ĉefa tasko estas zorgi pri granda poresperanta publiko.

S-ro *Couteaux* komunikas pri antentindaj sukcesoj en Francujo, kiuj alilande povas esti montrataj kiel precedencoj. De post oktobro oni havos la *permeson instrui Esperanton en ĉiuj liceoj kaj multaj aliaj lernejoj* (ne en la primaraj) dum sabato posttagmeze. Pri tio baldaŭ aperos cirkulero de la instrua ministerio al la rektoroj de la Akademioj.

S-ro *Olsson*, kiu estas seminariano kaj prezidanto de la Esperanto-klubo en la seminario de Göteborg, sciigas ke ili planas por la venonta jaro stipendion por vojaĝo al Bern.

S-ro *Bastien* voĉdonigas pri la Rezolucio; sed ĉar ne en ĉiu ĝin bone aŭdis antaŭe, oni petas la « vivantan laŭparolilon », s-ron *Dahl*, denove ĝin legi. Post tio ĝi estas unuanime akceptata.

Prenas la parolon D-ro *Ivo Lapenna* el Zagreb, elkore dankante en la nomo de la Komitato de IEL al tiuj kiuj, post la alvoko de s-ro Oliver, en la lastaj tagoj aliĝis kiel novaj individuaj membroj, precipe al f-ino Wolff el Nederlando, kiu eĉ fariĝis Patronino.

Poste oratoro daŭrigas, per elokventaj vortoj pledi por plej aktiva subteno al IEL: La nombro de la membroj de IEL kompare kun la nombro de esperantistoj estas malgranda, por ne diri hontinda. Kiam neesperantisto demandis vin pri la nombro de organizitaj esperantistoj, vi certe hontis ĝin diri. Kial la esperantistoj ne pli multe aliĝas al sia internacia organizo? Certe pro tio ke oni ne sufiĉe scias kion faras IEL por la internacia movado. IEL ja donas multe pli ol ĝi postulas. Ofte oni kredas ke la internacia Esperanto-organizado estas superflua. Sed fakte kiu organizas la universalaĵajn kongresojn, kiu faras la internacian propagandon, kiu aperigas jarlibron, gazetojn semajnan kaj monatan, kiu faras cent kaj cent aliajn servojn, se ne la internacia organizaĵo? IEL pruvis ke ĝi bone kaj konstante laboras. Ĉiu esperantisto devas subteni tiun laboron. Ne ĉiu esperantisto estas riĉulo; sed la kotizoj ne estas altaj. *Kiu ne kapablas oferi kelkajn bierojn aŭ cigaredojn jare por Esperanto, ne rajtas sin nomi esperantisto.*

Neniu valora ideo povas venki sen batalo; neniu batalo estas ebla sen ofero. Se la kotizon vi opinias ofero, faru tiun oferon, sen kiu ne estas atingeblaj pli grandaj rezultoj. En du landoj ni ne povas labori; tie la ĵurnaloj publikigas artikolojn sub titoloj « Entombigo de la mondlingvo » kaj simile. Sed ĉu nia movado dependas de tiuj landoj? Ne! Ekzistas ankoraŭ la tuta cetera mondo, kie ni povas labori, kaj kie Esperanto povos venki!

Oratoro parolis kun ardo kaj fervoro, kaj li tuŝis la ĝustajn kordojn en la koroj de l' gekongresanoj, kiuj entuziasme lin aklamas. « Ne forgesu vian entuziasmon de ĉi tie ĝis la IEL-budo ! » aldonas oratoro (t.e. por enskribiĝi kiel MJ, MA, MAH ktp. kaj por subskribi la varbgarantian promeson).

S-ro *Goldsmith* montras belan diplomon, kiun sendis al la kongreso la Registaro de Katalunujo, kaj legas ĝian tekston, jene :

Al S-ro Sekretario de la 30-a Universala Kongreso de Esperanto, Londono.

Leibnitz en la 17-a jarcento, en laborado por lingvo tuthomara, aludis la eminentan katalunon Lull (Lulio), kiu jam en la 13-a jarcento klopodis havigi universalan komprenilon al la homaro. Kaj ankaŭ laste, en la 19-a jarcento, grandaj katalunoj Sinibaldo de Mas kaj Bonaventura Aribau prilaboris universalan lingvon. Sed komence de la nuna jarcento, alia granda kataluno, Pi i Margall, publike kaj laŭde priskribis Esperanton mem, kiel solvon de la granda problemo.

Katalunujo ĉiam ŝatis homaran pacon kaj liberon, juston kaj amon, kaj tial ĝi en la nuna universala milito batalas por libero kaj justeco. Kaj komprenante ke Esperanto kaj Esperantismo estas afero por justeco interlingva kaj movado por paco internacia, la Registaro de la Generalitat de Catalunya plej simpatie atentis tiun aferon, tiun movadon, kaj profunde deziras grandan sukceson al la 30-a Universala Kongreso de Esperanto, kaj feliĉon al Granda Britujo, kiu okazigis ĝin, dum aliaj landoj publike kontraŭstaras kaj atencas pacon kaj liberon. Altestime salutas

LLUIS COMPANYS, Prezidanto de la Generalitat de Catalunya.

S-ro *Goldsmith* ankoraŭ komunikas ke la komunumo Hago (Den Haag en Nederlando) decidis starigi Esperanto-kursojn por policianoj, kaj ke ĉiu policano, kiu sukcesos en la ekzameno, ricevos premion de 10 guldenoj ; krome li legas du kondolajn telegramojn, pro la morto de f-ino Saxl, de Selfridge-Magazeno kaj de Frisa Esperanto-Rondo.

Post tio, gen. *Bastien* fermas la kunsidon.

Refoje fakkunvenoj, kaj Varia Vespero.

Hodiaŭ, vendredon, estas nur kvar fakkunvenoj : Kunsido de Unuiĝo de Esperantistaj Virinoj ; kunsido de aviadaj fakuloj ; kunsido de tiuj kiuj interesiĝas pri kontraŭalkohola movado ; kaj kunsido de la turismo-fakoj de la landaj asocioj. Mi partoprenis la laste-cititan.

Vespere la kongresano troviĝas en *Central Hall*, impona kunvenejo tutproksime al la Parlamentejo. Oni estis anoncinta ke la « *Varia Vespero* » estas « speciale pretigita por la kongreso kaj prezentota de infanoj el la Nacia Hejmaro kaj Orfejo por Infanoj ». Do, ni preparis nin por ia (tiel dire:) « infanaĵo ». Des pli agrable surprizitaj ni estas, kiam ni eniras la salonegon, el kiu nin salutakceptas muĝa muziko de granda orkestro. Ni opinias vidi potencon militistan muzikistaron ; sed rigardante pli atente,

ni rimarkas ke tiuj muzikistoj en ruĝaj bluzoj estas knaboj, sed ili ludas kiel plenkreskaj spertaj orkestranoj.

Kaj ni eĉ pli miriĝas pri la riĉa, varia, kaj artplena programo, kiun la geetuloj de la orfejoj Farnborough, Harpenden kaj Princess Alice plenumas kun vervoj kaj artisma kompreno. Jen la ĉarma bonveniga sceno « *Kandela Lumo* », jen la atletado, jen la parado de l' plejetuloj, kun tamburetoj kaj trianguloj kaj kun sia komika « tambur-majoro » — vera nigruleto, jen la « *Miniaturaj* », aŭ la lertega ŝnursaltado ! Aŭ la ksilofon-soloj, la solkanto de la ĉarma Molly, kaj la belega sonorila kvarteto de knabinoj el la orfejo en Birmingham — muzikspeco kiun multaj kongresanoj la unuan fojon aŭdis kaj ĝuis en sia vivo.

Sed la apogeo de la festa vespero estis spektaklo « *Esperanto* », aranĝita de nia samideanino f-ino *A. Waite* en Birmingham. Post kelkaj enkondukaj versoj, ŝi vokis unu post alia la landojn reprezentitajn en la kongreso, kaj ĉiufoje aperis po unu knabo kaj knabino kun la respekiva nacia flageto. Fine ĉiuj estis ariĝintaj sur la podio — simfonio el flagoj kaj koloroj — antaŭ la potenca orgeno, kaj supre tronis en esperplena verda vesto la personiĝo de nia « *Esperanto* ».

Estas memkompreneble ke la ĉeestantoj prezentis al la etaj geartistoj la plene merititan aplaŭdegon.

Dum la vespero s-ro *W. A. Gething*, membro de la LKK, dediĉis al la geknaboj vortojn de simpatio kaj danko ; respondis al li s-ro pastro *Parkinson*, unu el la sekretarioj de la hejmaro.

Sabato

La Ferma Kunsido :
Raportoj, multaj dankoj, kaj :
« *Ĝis Berno !* »

Sabato ! Ĉu fakte jam alvenis la lasta tago de la kongres-semajno ? Nekredeble, kiel rapide la tempo pasas, kiam oni sentas sin bonege en la rondo de homoj el la tuta mondo, fervorantaj kaj laborantaj por la sama ideo. Ankoraŭ nur kelkajn horojn, tiam la 30-a U. K. apartenos jam al la pasinteco, kaj denove kelkajn horojn, tiam la pli granda parto de l' kongresanoj estos jam ekster tiu ĉi urbego, survoje al siaj hejmoj aŭ al aliaj celoj...

Tre akurate, la prezidanto de la 30-a, s-ro *Fred Wadham*, malfermis la Ferma Kunsidon, en ĉeesto de la urbestro de la distrikto St. Pancras, kaj lia edzino: Hodiaŭ la esenco de la Ferma Kunsido estas tempo. Ni havas nur mallongan tempon je nia dispono. Tial mi ne faros paroladon.

Post kelkaj anoncetoj de s-ro *Gold-*

smith, tuj sekvas la raportoj de la fakkunvenoj :

Fino *Nixon* legas la raporton de TAGE, kun rezolucio duparta, kiu estas akceptata :

1. Konstatante ke la praktika uzado de Esperanto inter lernejoj estas nia celo kaj ankaŭ la plej bona propagandilo, kaj ke la ĉefa rimedo por efektiviĝi tion estas arangitaj interlernejan vizitadon kaj libertempojn, la TAGE-Kunveno rekomendas ke la Kongreso sendu gratulojn al la « *Juna Vivo* », interlerneja festo en Nederlando (kun almenaŭ 150 partoprenantoj), kaj ke IEL faru sian eblon instigi kaj subteni similajn arangojn en la estonteco.

2. Konstatante ke la Instruista Movado ne estas sufiĉe forta, parte pro manko de celkonscia kunagado kaj organizado, la TAGE-Kunveno rekomendas ke IEL elpensu planon por kunlabori kun TAGE celante speciale: 1. la starigon de instruistaj unuiĝoj laŭ la naciaj cirkonstancoj, kun laŭeble unu kotizo por TAGE kaj IEL; 2. pli efikajn servojn inter geinstruistoj kaj lernejoj.

Raporton pri la blindula kongreso faras s-ro *Karterud*. Li precipe dankas por la bonega prizorgo de la blinduloj dum ĉi tiu kongreso. Venis pli ol 100 geblinduloj kun gvidantoj. Granda estis la helpemo de la vidantaj kongresanoj. Se iu blindulo petis helpon, tuj dek personoj estis pretaj, kiam nur unu estis bezonata. Do ni blinduloj sentis speciale tiun senton de Esperantismo, kaj ni havas multon por danki al la viduloj.

S-ro *Wadham* atentigas ke la blinduloj estas nepra elemento en niaj kongresoj kaj demandas, kio niaj kongresoj estus sen ili.

S-ro *Isbrücker* prezentas la raporton de la Lingva Komitato; s-ro *Lewin* tiun pri la aviada fakkunsido; s-ro *Krolenbaum* tiun de KELI (Kristana Ligo); s-ro *Helge Eckerberg* pri kooperativanoj (oni fondis Internacian Ligon de Kooperativaj Esperantistoj); s-ro *Robertson* pri « *Denaska Esperantistaro* »; s-ro *Jung* laŭ peto de f-ino *Baxter*, kiu ne povas ĉeesti, pri kunsido de bahaanoj; s-ro *Butler* pri esperantista laborkomunumo por kontraŭalkohola movado.

S-ro *Malmgren* anoncas ke jam 100 kongresanoj subskribis sin kiel « varbgarantiantoj ». Oni sendos la « garantiĉekojn » al la landaj asocioj kaj, per tiuj, al la grupoj. La celo de tiu nova arango estas havigi al ni verajn kaj taŭgajn esperantistojn. Ĝis nun ni tro facile lasis foriri la komencantojn, kies plimulto estis « *Bonan-tagon-esperantistoj* ». Nun ni volas reteni kaj perfektigi ilin. Post unu jaro ni demandos vin en Bern, kaj espereble ĉiuj povos respondi : Jes, ni faris nian devon !

S-ro *Walder* ankoraŭ unu fojon invitas al la 31-a U.K. en Bern. Jam III aliĝis. Pli aj aliĝu ankoraŭ post la kunsido ! Fine mi voku al vi ne « *Ĝis revido !* », ankaŭ ne « *Ĝis revido en Bern !* » ; sed pli efika kaj pli instiga estas voki : « *Ĝis Berno !* »

S-ro *Bastien* : Nun venis por mi la plej malagrabra, kaj la plej agrabra momento de la kongreso. Malagrabra, ĉar ĝi signifas la disiĝon; agrabra, ĉar estas la momento adresi dankojn al la multaj personoj, kiuj helpis por la sukcesigo de tiu ĉi kongreso. Ne povante menciĝi ĉiun unuopan el la dekoj da gehelpintoj, li dankas nome al la kunvenestrino de la LKK, f-ino Rose Davey, al la prezidanto de la 30-a, s-ro Wadham, al s-ro Goldsmith kaj la IEL-oficistoj, al la urbestro de St. Pancras kaj lia edzino, sed cetero li dankas al ĉiuj, ĉar « kiu helpas al la sukcesigo de kongreso, se ne la kongresanoj mem, kiuj kreis tiun atmosferon de harmonio kaj konkordo, kian ni eble ne vidis en iu antaŭa kongreso ». Eĉ la suno esperantistiĝis, kaj kiel la novebakitaj esperantistoj ĝi estis plena de varmo kaj ardo. Jes, ĉi tiu estis belega kongreso!

Ankoraŭ menciinte la fatalan baton, kiu trafis la kongreson per la morto de f-ino Saxl, kaj instiginte, en 1939 multnombro viziti Bernon, gen. Bastien esprimas la esperon ke en la 31-a ni povos raportari pri grandaj novaj sukcesoj de nia kara Esperanto.

F-ino *Davey* dankas pro la honoro kaj la floroj, prezentitaj al ŝi.

Poste la urbestro, s-ro *John Sporni*, ankoraŭ unu fojon prenas la parolon por simpatia adiaŭo: Mr. President and friends everyone! (S-ro Prezidanto kaj ĉiuj amikoj!) Ĉio bona iam finiĝas. Ĉi tiu kongreso estis vera sukceso; ĝi certe vekis la popolon de tiu ĉi lando pri la neceseco de internacia lingvo. De kiam via kongreso startis, mi ricevis el ĉiuj partoj de la lando leterojn kun demandoj, kie oni povas lerni Esperanton. Al kelkaj mi respondis ke la plej bona vojo por lerni Esperanton, estas veni al St. Pancras. Mi estas tre impresita de via ĝentileco; tia ĝentileco estas ebla nur, se oni kunvenas kiel vi, esperantistoj. Vi sciuj, ke ĉi tie vi trovis almenaŭ unu sinceran amikon en la persono de la urbestro de St. Pancras, kaj se vi havos ian peton rilate al via afero, konfide turnu vin al mi! Mi finas en via propra lingvo: « Mi deziras al vi bonan vojaĝon!»

S-ro *Wadham*: Ekzistas ŝerco: « S-ta Georgo por Londono; S-ta Pankracio por Skotlando!» Nun ni povas diri: « Sankta Pankracio por Esperanto!»

S-ro *Malmgren* esprimas dankon al gen. Bastien. Vi vidis, kiel elokvente, firme sed mole, kvazaŭ patro, li gvidis niajn kunvenojn. Sed la tasko de prezidanto estas, labori dum la tuta jaro. Ni povas vere gratuli nin ke ni havas tian prezidanton. Ni esperas ke ankoraŭ dum multaj jaroj li restos prezidanto kaj kiel patro gvidos la esperantistan familion.

S-ro *Bastien* redonas la dankon al la Komitato; kun tia komitato kunlabori (li diras) estas vera ĝojo.

Li fermas la kunsidon je 11.30.

« La Espero », krioj « Ĝis revido en Bern! », lastaj manpremoj, — kaj finita estas la tiel agrable, tiel harmonie pasinta 30-a Universala Kongreso.

Teo Jung.

★

Sabatvespere...

Ankoraŭ unu fojon mi iras tra Gower Street, preterpasas la Universitatan Kolegion. Ĝi kuŝas forlasita. Nur la transparento kun indiko pri la 30-a U. K. ankoraŭ troviĝas super la enirejo. La nokto falas sur la urbegon. Melankolie mi plu iras al mia hotelo.

Malĝojiga devo Postkongresa

Post la kongreso, restis ankoraŭ unu malĝojiga devo: entombigi nian samideaninon kaj kunbatalintinon *Margarete Saxl*.

Sin trovis ankoraŭ pli ol cent samideanoj ĉe *Hendon Park Cemetery* (Parka Tombejo de Hendon) lundon matene je la 11-a. Pluvo jam ĉesis, kiam alvenis la aŭtomobilo kun la ĉerko, ornamita per belaj florkronoj.

En la tombeja kapelo pastro *Downes* celebris simplan sed kortuŝan funebran servon, kun paroladeto sub la devizo « Mi estas la releviĝo kaj la vivo ». Li diris ke ni envere ne funebras mortintinon, sed ke ni celebras la forpason de vivanto. Oni ne povis eltrovi familianojn de f-ino Saxl, sed ni reprezentas ilin. Ne

mankas al ŝi la amo. Ni ankaŭ reprezentas la kongresanojn, kiuj ne povas ĉeesti, eĉ la tutan esperantistaron, al kiu ŝi estis bone konata. Ŝi bone servis nian movadon, ne nur per sia lerteco instrui sed ankoraŭ pli per la spirito, kiun ŝi estigis inter la lernantoj. Ni salutas ŝin, kaj ni lasas ŝian spiriton al la Dio kiun ŝi amis kaj servis.

Ĉe la tombo montriĝis, kiom da simpatio kaj amo f-ino Saxl posedis inter la esperantistaro. Unu post alia paŝis la ĉeestantoj al la tombofosajo, dediĉante al ŝi elkoraĵn vortojn de danko kaj adiaŭo. Estis ŝiaj amikoj kaj konatoj el multaj landoj. Kortuŝa estis la lasta saluto de angla samideanino: « Ni ja deziris havi ŝin en Londono ankoraŭ post la kongreso; sed ni ne esperis, havi ŝin ĉi tie por ĉiam. Sed nun, kiam la sorto jam decidis ke ŝi restu ĉe ni, ni promesas ke ni bone flegos ŝian tombon kaj ofte ĝin vizitos... »

49 jarojn ŝi havis. Ĝi estis ankoraŭ bona aĝo. En tiu aĝo kutime oni kapablas ankoraŭ multon fari por la ideo kiun oni amas. La sorto decidis alie; kaj estis aliaj cirkonstancoj kiuj kontribuis al tio. Homoj iufoje povas esti malmolaj; sed Dio estas pardonema. Ni kuntiru la kurtenon kaj silentu...

★

Kaj nun mi sidas denove en mia kortoreto apud la dunoj en Scheveningen. Mi kolektas miajn notojn kaj pensojn pri la Trideka, kaj konstatas refoje ke ĝi estis belega, harmonia, kaj plensukcesa.

La Postkongresa Libertempo en Hoddesdon

Post unu semajno certe ĉiam interesplena sed kompreneble iom laciga, ĉu sekve de partopreno en la laboroj de la tiel bone organizita Kongreso, ĉu sekve de multspecaj vizitoj aŭ ekskursoj en la grandega urbo Londono, aro da gekongresanoj veturis aŭtoĉare al Hoddesdon.

High Leigh, Hoddesdon, estas por kvindekda diverslandaj samideanoj neforgesbla nomo de postkongresa libertempejo.

Kaj estas multaj kialoj por tiu neforgeslebleco.

Temas unue pri rava loko, vera kastelo, riĉe aranĝita meze de ampleksa parko kun multspecaj arboj, kun florbedoj, terasoj, ludgrundoj por ĉiuj sportemuloj.

Temas ankaŭ pri la plej amika kunesto de diverslingvaj personoj kiuj, kvankam venintaj ne nur el diversaj regionoj de Anglujo sed ankaŭ el Belgujo, Francujo, Nederlando, Rumanujo, Svedujo kaj eĉ el Kanado, Usono kaj Aŭstralio, dank' al sia kara komuna helplingvo, dum unu semajno faris el High Leigh malgrandan sed realan Esperantujojn, meze de kiu flirtis verda flageto kaj en kiu, plie, la ĉarmaj esperantistinoj formis agrablan plimulton.

En tiaj feliĉaj loko kaj rondo oni ne nur povis ĝui per kvieta ripozado aŭ per legado, ludado kaj promenadoj, sed ankaŭ per instruigo sur la Esperanto-kampo, dank' al la prelegoj de s-ro **P r a g a n o**, kiu en lerta, agrabra, sprita maniero ĉiutage kontaktigis atentajn aŭskultantaron kun nia jam tiel diversa kaj riĉa

Esperanta literaturo, kaj tiamaniere sukcesis kunigi en Hoddesdon la utilan kun la agrabla.

Aliparte la sindonemaj gesinjoroj **H o l m e s**, kvazaŭ gvidantoj de granda familio de libertempuloj, plene sukcesis aranĝi vagadojn en la bela apuda ĉirkaŭaĵo, aŭ interesplenajn ekskursojn al Rickmansworth kaj al Cambridge, aŭ amuzajn vesperkunestojn, dum kiuj la anglaj kaj eksterlandaj samideanoj klopodis amuzi la libertempulojn per kantoj, muziko, ludoj kaj eĉ per iluziaĵoj. Tiurilate mi speciale citu lumbildan prelegon de gesinjoroj **H a n k s** pri longa vojaĝo, kiun ili faris en sia hejmlando, la antipoda Aŭstralio.

Se mi aldonas, ke vere estus peko forgesi ĉi tie la komforton de la gastejo kaj la variecon kaj bongustecon de la manĝaĵoj, oni certe komprenos ke la Hoddesdona libertempo ne nur postlasos ĉe la partoprenintoj la plej agrablan impreson sed ankaŭ kreis aŭ plifirmigis internacian amikecon kaj la Zamenhofan spiriton.

Feliĉa aldonaĵo al la multaj rememordaĵoj estas la Hoddesdona gefianĉiĝo de nederlanda samideanino f-ino **S m i t** kaj angla s-ro **G r e g o r**, kiuj konatiĝis dum la Varsovia kongreso kaj decidis unuigi siajn vivojn sub la signo de la verda stelo.

Vere, la Organiza Komitato de nia 30-a Universala Kongreso havis bonan inspiron, organizante tian postkongresan libertempon, kaj kreis imitindan ekzemplon por postaj kongresoj.

J. Alofs.

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 86 18-an de aŭgusto 1938.

NOVA ĈEFDELEGITO:

Svislando

Bern: Otto Walder, Wiesenstrasse 56.

NOVAJ DELEGITOJ:

Acoroj

Horta (Faial). — D: Domingos Garcia, Apotekisto.

Belgujo

Erembodegem (Oost-Vlaanderen). — D: F-ino G. Thesin, Instruistino.

Brazilo

Fortaleza (Ceará). — D: Demócrito Rocha, Rua Major Facundo, 670.

São Paulo (S. Paulo). — FD (Virinaj aferoj): D-rino Azália Machado, Rua Boa Vista, 15 - 4^o and.

Britujo

Chichester (Sussex). — D: W. J. Morey, 38 Washington Street.

Bulgarujo

Gara Kričim (Plovdiv). — D: E. J. Jankov, oficisto.

Ruse. — FD (Filatelio): St. Dimitriev.

Ĉeĥoslovakujo

Bystrice p. Host. — D: Jar. Tomčík, instruisto.
Zlonec (Bohemio). — FD (Ŝak-ludo): V. Faigl, Náměstí c. 6.

Danlando

Horsens (Jylland). — FD (Ĝardenkulturo): H. Olesen, Vestergade 90.

Francujo

Aurillac (Cantal). — D: C. Alais, 9, rue Emile Zola.

Valence (Drôme). — D: R. Puigrenier, 8, rue Lapurousse.
VD: M. Clavel, 12, Place de la Paix.

Hungarujo

Makó (Csanád). — D: S. Kemény, Dessewffy tér 17.
FD (Abelkulturo): La D.

Jugoslavujo

Karlovac (Savska Banovina). — D: D-ro V. Jo-
vanovic, Radiceva 34.
FD (Medicino): La D.

Palestino

Hadera. — D: D.J. Rabinowitz-Tajc, Herzal-str
VD: N. Wolfovski.

Svedujo

Arvika (Värmland). — D: E. Hult, Myråsen.
Prässebo (Västergötland). — D: T. Lindberg.
FD (Ŝak-ludo): La D.

Usono

Middletown (Delaware): D: G. Nickel, 14 West
Cochran St.

SANGOJ:

Brazilo

Niterói (Rio-de-Janeiro). — Nova D: Adinar
Antunes Pinheiro, Rua Dr. Pereira Nu-
nes, 116.

Britujo

London. — FD (Eksporto): (Nova adreso) F.C.
Midas, 67 Sutherland Avenue, W. 9.

Paignton (Devonshire). — D: (nova adreso) C.
W. Tubb, 5 York Road.

Sowerby Bridge: Provizore ne estas D.

Stoke-on-Trent: Provizore ne estas FD (Ase-
kuro) pro translokiĝo.

Ĉeĥoslovakujo

Znaim (Moravio). — FD (Filatelio) nova adreso:
Schmiedgasse 3.

Finnlando

Somero. — Peranto: La adreso restas en Somero

Svislando

Basel. — D: (nova adreso): W. Kindler, Poŝt-
fako 7541.

MEMBRO-SUBTENANTOJ:

127. S-ino P. Dr. Korabova, Ruse, Bulgarujo.

128. S-ro R. Rayner, Cambridge, Anglujo.

129. F-ino L. Sandberg, Bekkelaget, Norvegujo.

130. S-ro Seitaro Ŝindo, Osaka, Japanujo.

131. S-ro J. L. Mackenzie, Newport, Anglujo.

SUPLEMENTO AL LA JARLIBRO.

La Komitato decidis eldoni suplementon, kiu kredeble aperos en la fino de septembro aŭ komenco de oktobro. Krom la aliigoj kaj aldonoj al la delegita listo, ĝi enhavos raporton pri la 30-a Kongreso. Ni povos nur enskribi ŝanĝojn ricevitajn antaŭ la 10-a de septembro.

★

KOMITATO.

La elekto de la Komitato por la nova periodo nun kompletigis kaj la nuna listo de komitatanoj estas:

S-ro P. W. Baas, Nederlando.

Intendant-Generalo L. Bastien, Francujo.

S-ro P. Blaise, Anglujo.

Kapitano R. Bugge-Paulsen, Norvegujo.

D-ro Odo Bujwid, Pollando.

D-ro Giorgio Canuto, Italujo.

D-ro J. Cousteaux, Francujo.

S-ro Einar Dahl, Svedujo.

S-ro Delfi Dalmau, Katalunujo.

D-ro Carlos Domingues, Brazilo.

S-ro René Dubois, Francujo.

S-ro W. Grolleman, Nederlando.

S-ro K. Th. Hansen, Danlando.

S-ro F. Heikenwälder, Ĉeĥoslovakujo.

S-ro H. W. Hetzel, Usono.

Rektoro Sam Jansson, Svedujo.

D-ro Paul Kempeneers, Belgujo.

D-ro Ivo Lapenna, Jugoslavujo.

S-ro B. E. Long, Anglujo.

S-ro E. Malmgren, Svedujo.

Prof. St. Minkov, Bulgarujo.

S-ro A. C. Oliver, Anglujo.

S-ro Pierre Petit, Francujo.

S-ro M. Rollet de l'Isle, Francujo.

Ing. G. Scholze, Ĉeĥoslovakujo.

S-ro Seitaro Ŝindo, Japanujo.

C. C. GOLDSMITH,

Generala Sekretario.

15-a Int. Kongreso de Blindaj Esperantistoj

La kunestado dum tuta semajno de okdek blindaj esperantistoj el dek landoj havas grandan signifon por la tutmonda blindularo, al kiu Esperanto provizas ne nur akademian ludilon sed potencon rimedon por plibonigi la vivostaton. Ĉie manko de vido kunportas la samajn malhelpaĵojn, kaj ĉie viglaj cerboj elpensas novajn solvojn por similaj problemoj, — solvojn, kies sukceso efektiviĝus multe pli certe kaj rapide, se ĉiuj laborantoj profitus la spertojn kaj sciojn de la aliaj.

Por efika kunlaboro oni bezonas unue amikiĝi, kaj por amikiĝi necesas renkontiĝi. Ordinare, blinduloj ne kapablas vojaĝi; ili do ĝojegas aliĝi karavanon por Esperanta Kongreso, kaj ofte ŝparas dum jaroj por akiri la vojaĝajn elspezojn.

Pro tio, la unua celo en la Londona Kongreso estis, ke la blindaj kongresanoj interkonatiĝu unu kun aliaj kaj, laŭeble, ĉiuj kun vidantaj samideanoj, por ke oni ne rigardu ilin kiel apartan homspecon, sed kiel ordinarajn individuojn kun diversaj emoj kaj karakteroj. Gajaj ili ja estis, tion rimarkis ĉiuj, kiuj vidis ilin en la kunsidoj, la balo, kaj precipe en la hotelaj salonoj, kie ĝis malfrue en la nokto ili sprite babilis, ĝis eĉ la hotelistoj rimarkis, ke ili neniam memoris pli ĝojan amason da gastoj.

Sed krom tiu gajeco oni multe laboris. La programo enhavis vizitojn al blindulaj laborejoj,

kie oni studis labormetodojn kaj produktaĵojn; al la Nacia Instituto por Blinduloj, kie oni zorge ekzamenis la anglajn skrib- kaj presmaŝinojn kaj diversajn edukajn aparatojn; al la « Home Office Industrial Museum », kie ili konatiĝis kun geniaj, praktikaj ŝirmiloj kontraŭ akcidentoj dum maŝinlaboro, per kiuj eĉ blinduloj povas sendanĝere okupiĝi en industrio. La studemaj ĝoje palpis antikvaĵojn tre afable montritajn de spertaj prelegantoj en la British Museum. Lingvistoj vigle sin ekzercadis je elparolo de naciaj lingvoj — ĉar la instruo de modernaj lingvoj estas grava monrimedo al kelkaj el niaj gastoj. La muzikemuloj, blindaj artistoj el kvar landoj, donis belegan koncerton, la 1-an de aŭgusto, kie troviĝis kelkaj vidantaj kongresanoj, kiuj havis biletojn por la teatro la sekvintan tagon.

Mardon, f-ino C. Elgar montris, kiel lerte blindulo povas plenumi oficejajn taskojn, skribante leterojn kaj eĉ komplikajn versarojn je diktado, kaj tuj relegante la tekstojn. Kaj ni ne forgesu la belajn gvidhundinojn, kiuj gvidis du fraŭlinojn al kunveno!

Dum la semajno ni aŭskultis prelegojn pri blindulaj aferoj, ekzemple, pri blindaj ĵurnalistoj, juristoj, k.a., kiuj eble kuraĝigos diverslandajn blindulojn profiti siajn talentojn en tiuj kampoj de agado.

Senkulpigu min, kara leganto, pro priskribo

de tiom da detaloj, sed mi volas, ke ĉiu komprenu la gravecon de kongreso por blinduloj, kaj ke ĉiu kreu je la profunda dankosento de la blindularo al la Kongresa Komitato pro ĝiaj netakseblaj favoroj donitaj al niaj kongresanoj. Ho! estas domaĝe de ĉiuj komitatanoj ne aŭdis la egan aklamon, kiam oni anoncis, ke nia ĉefa pioniro kaj kondukanto, s-ro Harald Thilander, estis elektita unu el la Vic-Prezidantoj de la 30-a Universala Kongreso de Esperanto!

Fine, mi petas permeson de s-ino Thilander citi la jenajn strofojn improvizitajn de ŝi:

Adiaŭo en Londono.

La 6-an de aŭgusto 1938.

Renkontiĝi kaj disigi ĉiam
Estas vivregulo sur la tero.
Sed disigi kaj revidi iam
Estas pens' konsola de espero.

En ĉi tiu monda metropolo
Multon spertis ni kaj multon vidis,
Dum la geamikoj kun bonvolo
Ni tra ĝiaj mirindaĵoj gvidis.

Tamen ni fariĝis ja pli riĉaj
Pri la novaj spertoj kaj la scioj,
Kaj memoroj gajaj kaj feliĉaj
Sekvas nin kun lumaj fantazioj.

W.P.M.

LA ESPERANTISTA REKLAMO

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

Naskiĝo. Al ges-anoj Stuit-Decaudin en **Aras, Francujo**, naskiĝis la 16.8.1938 filo, nomita Marko. — Ni kore gratulas.

Sian oran jubileon kiel katolika monaĥo-misiisto festis nia samideano Frato Wigbertus van Zon en **Yught, Nederlando**, membro de la Lingva Komitato kaj de la Nederlanda Ekzamena Komitato (Esperanta). — Nian koran gratulon!

Brazila Ligo Esperantista intencas fari **ekspozicion de Esperantaj** okaze de la Unua Internacia Filatelie Ekspozicio (BRAPEX), efektiviĝonta en Rio-de-Janeiro, dum la monato oktobro nunjara, en la Palaco de Belartoj, kiu staras ĉe la multvizitata Avenuo Rio Branco. Bonvolu sendi afiŝojn, prospektojn, bildkartojn, poŝtkartojn kun teksto en Esperanto kaj glumarkojn al: **Brazila Ligo Esperantista, Praça da República 54, Rio-de-Janeiro, Brazilo.**

Sveda fraŭlo deziras korespondi kun fraŭlinoj el ĉiuj landoj. S-ro Paul Isacsson, Brogård, **Vattholm, Svedujo.**

33-jara svedo serĉas korespondantojn. Temo: vivkondiĉoj kaj interŝanĝo de amatorfotoj. Anton Palm, Kvisthamragatan 12, **Norrälje, Svedujo.**

Esperanton en sporton! Sveda sportisto-esperantisto deziras kontakti kun ĉiulandaj samideanoj-sportistoj, kiuj havas intereson pri sporto ĝenerale kaj futbalo speciale. La celo estas esplori la eblecojn propagandi Esperanton inter sportemuloj laŭ nova moderna metodo. — Skribu multnombre al « Esperanto-Futbalo », **Skövde P.R., Svedujo.** — Respondo garantiata.

Hugo Gerisch, Picton (Ontario), Kanado, deziras interŝanĝi poŝtkartojn de Kanado, Newfoundland, kun seriozaj gefilatelistoj en la tuta mondo.

Japanaj studentoj de pedagogia kolegio deziras korespondi kun ĉiulandaj esperantistoj. Bonvolu skribi al: Tukiĥora-Juzuru, Niŝiokubo 44, **Jodobaŝiku, Tokio, Japanujo.** (525)

Por la « Verda Semajno », kiu okazos en nia lando je 25.9.-2.10.1938, oni petas alsendon de diversspeca propagandmaterialo (afiŝoj, diversaj prospektoj, broŝuroj, flugfolioj, libroj ktp.). — Jugoslavia Esperanto-Ligo, Daniĉičeva ul. 2, **Zagreb, Jugoslavio.** (528)

Nederlando: S-ro N. Zilver, Zach. Jansstraat 53, **Amsterdam,** deziras poŝtkartojn kaj bildkartojn el aliaj landoj (Centra Eŭropo nur laŭdezire). (529)

Deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj: S-ro Lajos Podhorszky, Nimród-str. 26, **Pestszentlőrincz, Hungarujo.**

Mexico D.F., Apartado 2482, M.C. Rodriguez, serioze interŝanĝas poŝtkartojn kun ĉiulandanoj. Sendu almenaŭ por po 50 frankoj! Respondo garantiata.

Sendu al mi poŝtkartojn de via lando, kaj interŝanĝe vi ricevos la saman kvanton da svedaj markoj! Respondo garantiata. Arne Pettersson, Storgatan 8, **Oskarshamn, Svedujo.**

Mi deziras korespondi kun eksterlandaj samideanoj pri ĉio. Certe respondo. Nils Samuelsson, Besvärgatan 11, **Oskarshamn, Svedujo.**

Korespondadon deziras kun tutmondaj samideanoj: S-roj Masazumi, Ŝibahara kaj H. Oomura, **Insulo Angaur, Karolina Insularo, Japana Kolonio, South Sea.**

Mihajlo Bogdan, Drzavna svilara, Novi Sad, Jugoslavio, deziras interŝanĝi uzitajn poŝtkartojn kun filatelistoj **nur el Ameriko.**

Vladimir Harlamov, Vladike Gedeona 10, Novi Sad, Jugoslavio, deziras interŝanĝi uzitajn poŝtkartojn, sed nur kun filatelistoj el Eŭropo.

Jozef Plha, Drzavna svilara, Novi Sad, Jugoslavio, deziras poŝtkartojn uzitajn interŝanĝi, sed nur kun filatelistoj el Eŭropo.

Turismo. Mi deziras interŝanĝi kun angla samideano **por starigi en Anglujo vojaĝ-oficejon.** Skribu (esperante aŭ angle) kun referencoj al s-ano Jos. Snykers, 32, rue de l'Eglise, **Ostendo, Belgujo.** (533)

Al ĉiu esperantisto, de kiu mi ricevos antaŭ la 1-a de decembro nunjara unu ŝilingon (afrikan aŭ anglan) aŭ kvar respondkuponojn, mi adresos koverton « antaŭ-migrulan » (se ne elvendita), kiu faros la lastan parton de la bovogonmigrado al Pretoria, kaj ricevos la specialan poŝtstampon de la 16-a de decembro. — J. Semmelink, Bus 1246, **Pretoria, Sud-Afriko.** (532)

La Suno N-ro 7 klarigas la veran staton de la ĉina afero, kaj respondas al gravaj demandoj. Petu **senpagan ekzempleron** de s-ro Josio Ogasaŭara, Tojohara-ĉo, **Uakajama-ŝi, Japanujo.**

Juna, sperta Cseh-instruisto petas laboron por la venonta sezono. Adreso: Martien van de Haterd, Dijkstraat 125 B, **Rotterdam (Oost), Nederlando.**

Geesperantistoj, vojaĝontaj tra Nürnberg en Germanujo, informu antaŭe s-ron Hans Raab, Austrasse 84, **Nürnberg W. 7,** por ke ni povu renkonti kaj gvidi vin! (530)

Atentu! Leteroj adresitaj al mia antaŭa adreso Wien 1, Neue Burg (inter 22.3.1938 kaj nun), ne atingis min. Bonvolu de nun nur skribi al mia privata adreso: Hofrat Hugo Steiner, Bundesstrasse 154, **Bisamberg bei Wien, Germanujo.** — « Aŭstria Esperantisto » de post marto ne plu aperas. (531)

S-ro Bruno Voits, fotografisto, serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj kaj deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, fotojn. — Stabu iela 111a — 2, **Riga, Latvujo.**

Du germanoj deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj pri ĉiaj temoj. Respondo garantiata. Josef List, Ottostrasse 21/H/II, **Nürnberg A.,** kaj Paul Trampel, Engelhardsgasse 19/III, **Nürnberg A., Germanlando.**

« **El Verdavalo.** » — **Progresintoj kaj komencantoj** same ĝuos la rakontojn kaj artikolojn, interesajn kaj amuzajn, pri homoj kaj bestoj de Borneo kaj aliaj aziaj landoj, en « El Verdavalo », n-roj 1 ĝis 3. Tri bone presitaj libretoj, po 16-paĝaj, tre favore recenzitaj en nia gazetar. Unu numero kostas 2 internaciajn respond-kuponojn; la tri jam aperintaj numeroj por 5 kuponoj. — Kursgvidantoj! Jen neordinara legaĵo, bona sed malkara, por viaj kursanoj. Provu! — Mendu de R. F. Vaughan, **Sandakan, B.N. Borneo.** (518)

Kvakerismo kaj Paco. Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1, Anglujo.** (432)

Senpage publikigas adresojn de geknaboj, kiuj deziras korespondi, la monata infanzeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: Marathonweg 15, II., **Amsterdam, Nederlando.** (453)

Post la kongreso faru raporton, montrante la **lumbildojn pri Londono.** Serio sur facile sendebla filmrubando, uzebla en normal-aparatoj, havebla afrankite por sv.fk. 6.—, ŝil. 5.—, dol. 1.30. — Skolta Esperantista Rondo, pa. P. Balkányi, Kreditbanko, **Budapest 507, Hungarujo.** (527)

Nekatolikoj senpage povas ricevi informojn pri la katolika kredo ĉe la « Internacia Katolika Informejo », Fraterhuis, de Vliert, **'s-Hertogenbosch, Nederlando.** (526)

Portugalo deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj pri ĉiaj temoj. Respondo garantiata. S-ro Werther Sacramento, Rua Gonçalves Ramos 88, **Amadora, Portugalujo.**

Poŝtkartoj dezirataj por propagando! Esperantosocieto intencas disdoni 10.000 flugfoliojn kaj, cele de propagando, sur ĉiu dua folio glui eksterlandan poŝtkarton, por speciala atrakcio. Bonvolu alsendi poŝtkartojn, — ni sendos niajn aŭ rekompencos alimaniere. Josef Stankuš, **Poruba u Orlové 562, Ĉeĥoslovakio.**

Samideana helpo petata. 46-jarulo, aktive laborinta por la movado, serĉas rifuĝon en transmara lando, Aŭstralio, Novzelando, Ameriko. Perdis oficon pro rasa kaŭzo; ricevas regulajn paperojn, ĉar politike ne suspektita. Konstru-inĝeniero. Laboris en gravaj firmoj plej diversaj, disponas je brilaj atestoj. Dum 9 jaroj ŝtata oficisto; studis juron; bona organizanto kaj energia. Akceptas kion ajn, estas sana, senfamilia, bona karaktero. Ofertojn sub « Esperantista Interhelpo 1 » peras la redakcio.

Kiu helpos? Esperantistino kun knabo, sperta mastrumantino, serĉas rifuĝon. Juna, sana, laborema kaj modesta. Posedas regulajn dokumentojn de origino, pasporton ktp. Politike ne ŝarĝita kaj ne suspektita. Ofertojn sub « Esp. Interhelpo 2 » peras la redakcio.

Kiu prunto 320 dolarojn? Samideano, devigata forlasi sian landon kaj posedanta ĉion necesan (permeson instaliĝi en transmara lando, pasporton ktp.) devas deponi kiel garantian la sumon de 720 dolaroj. La duonon li jam kolektis. Mankas ankoraŭ 320 dolaroj. Li petas, ke oni pruntu al li tiun ĉi sumon, pageblan en Nederlando, de kie li forveturos perŝipe. Repago partote kun rentumo. Ofertojn sub « Esp. Interhelpo 3 » peras la redakcio.

Presejo de Belgia Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.

